

EL POPOLA ĈINIO


人民中國報道




3

1958

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO



Devizo: Superu Brition en la ĉefaj industriaj produktoj!




La artistoj kreis diversajn figurojn por simboli la impetan konstruadon socialisman.

La traktoroj fabrikitaj en Tianjin estas unuj el la multaj novaj produktajoj kreitaj en la industria impetado.



Forstiga kampanjo disvolviĝas ne nur inter la plenaĝuloj sed ankaŭ inter la geknaboj tra tuta Ĉinio.



Nia penlaborado en socialisma konstruado estas por paco kaj feliĉo por ni mem kaj niaj infanoj.



MAJ-UNUA

FESTO DE LABORO POR
PACO KAJ FELIĈO

Ĉijare la maj-unua demonstracio en Pekino karakteriziĝas per la flama entuziasmo de la popolamasoj per impeta konstruado de socialismo por firmigi mondpacon kaj certigi al si plibonajn vivkondiĉojn.

GUAN HAN-QING

—Granda Dramisto en la 13a Jarcento—

I

EL la antikvaj ĉinaj dramoj verkitaj antaŭ la mezo de la 13-a jarcento, neniu konserviĝis ĝis la nuna tempo. Sed dum la periodo ekde la mezo de la 13-a jarcento ĝis la fino de la 14-a, aperis kiel bambuido post printempa pluvo multaj grandaj dramistoj, kies verkoj transdonitaj de generacio al generacio ĝis hodiaŭ nombras pli ol 200 pecojn. Ĝi estis grava periodo en la historio de ĉina literaturo, kaj ankaŭ la ora epoko de ĉina dramo, kiu de la komenco prosperis eksterordinare. Inter la cent floroj kune florantaj tiam estis la plej brila talenta dramverkisto Guan Han-qing.

En la ĉina historio, la periodo inter la mezo de la 13-a jarcento kaj la fino de la 14-a estas la

Yuan-dinastio aŭ la mongola epoko. En 1234 la mongoloj konkeris la Nüzhen-tartarojn en norda Ĉinio kaj preskaŭ tute heredis ĝian jam sufiĉe disvolviĝintan kulturen heredaĵon, inkluzive tiajn literaturajn juvelojn kiaj dramoj. En februaro, 1279, Kublajĥano unuigis Ĉinion renversinte la imperion de la Suda Song-dinastio. La florantan kulturen trezoron de la Suda Song-dinastio ankaŭ transprenis la mongoloj.

Tiutempe en la suda parto de Ĉinio populariĝis dramo nomata *xiwen*, kiu uzis sudĉiniajn ariojn kaj dialektojn, kaj ofte bezonis pli ol unu tagon por prezentado. Sed en la nordo populariĝis dramo nomata *zaju*, kiu estis tute malsama. Ĝi disvolviĝis el eposaj baladoj de norda kaj centra Ĉinio, kiuj estis parte parolataj kaj parte kantataj. Tiam la lasta okupis la ĉefan lokon en la drama movado. Sekve la dramverkistoj ankaŭ sin okupis ĉefe per verkado de *zaju*.

Guan Han-qing, la plej granda dramverkisto de *zaju* en tiu tempo, dediĉis sian tutan vivon al tiu ĉi drama movado. Antaŭ li ankoraŭ ne troviĝis tia granda *zaju*-verkisto kia li estis. Verŝajne li la unua kreis tiun specon de dramo, kiel Eŝilo la grekan tragedion. Guan Han-qing estis tiel fekunda, ke li kreis sesdek ses verkojn en *zaju* dum sia vivo, preskaŭ duoble de tiuj de la granda angla dramisto Ŝekspiro, sed li ne estas tiel bonŝanca kiel la lasta, ĉar el liaj verkoj konserviĝis nur iom pli ol kvarono, nome 18 dramoj.

Guan Han-qing estis naskita en Hanbalik en la regiono de nuna Pekino. Sed iuj diras, ke lia hejmo estis en Wuren-vilaĝo, Anguo-gubernio, Hebei-provinco. Li naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1210. Kiam la mongoloj konkeris nordan Ĉinion, Guan estis dudek-kvar(kvin)-jara junulo. En Yuan-dinastio, aktiviĝis lia agado en dramverkado. Multaj influitaj de li ankaŭ skribis diversajn *zaju*-verkojn.

Post la faligo de la Suda Song-dinastio fare de la mongoloj, Guan Han-qing vizitis Hangzhou, la ĉefurbo de la Suda Song-dinastio. La vizito devis okazi mallonge post la jaro 1279, kiam li estis proksimume sepdekjara. La tempo de lia

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo — Portreto de Guan Han-qing (Pentris Li Hu)
Industrio en la Montarojn
Tra Montoj trans Markolon al Xiamen
Fekunda Gruzo-kampo
Lernejo por Kulturi Kamparanajn Intelektulojn
Sigelifarado kiel Arto
Post la Emeritiĝo
Kurso de Ĉina Lingvo
La Okcidenta Zhou-dinastio
Bildo sur la dorsa kovrilo — Floroj kaj Birdoj (Pentraĵo de Song-dinastio)



Sceno el "Preĝo al la Luno" Foto de Ji Lian-po

morto estis inter 1298 kaj 1300. Kvankam li estis dramverkisto en la unua periodo de Yuan-dinastio kaj ne ĝisvivis la 14-an jarcenton, tamen li havis tre grandan influon sur la prosperiĝo de la drama movado en Yuan-dinastio dum la 14-a jarcento. Ni eĉ povas diri, ke sen Guan Han-qing estas dubinde ĉu la "epoko de la Yuan-dramoj" en la historio de la ĉina literaturo povus esti la sama, kiel ni ĝin trovas hodiaŭ.

II

DUM teatro de Yuan-dinastio ŝuldis sian prosperon al la klopodoj de Guan Han-qing k.

a. dramverkistoj, pli grava kialo por ĝia prospero estis la sociaj kondiĉoj, kiuj ebligis la disvastiĝon de *zaju* tra tuta Ĉinio. Post la mongola invado, la longdaŭre reginta feŭda klaso ĝisfunde disfalis. La malnovan bienulan klason ankoraŭ ne anstataŭis la nova. La ekspluatado malpliiĝis kaj konsekvence la vivkondiĉoj de la kamparanoj iom boniĝis provizore. Samtempe, pro tio ke la jam delonge blokita komunikoj al la Okcidento estis remalfermitaj de la mongoloj, granda kvanto da ĉinaj metiartaj kaj agrikulturaj produktaĵoj, kiel silkajoj, porcelanoj, teo, ktp. estis

eksportataj surtere kaj transmare. Tio ne nur plibonigis la vivon de metilaboristoj en la urboj, kiuj estis jam sufiĉe prosperaj en Song- kaj Jin-dinastioj, plibonigis la vivon de la kamparanoj en la vilaĝoj, sed ankaŭ plimultigis la rigardantaron de teatroj kaj stimulis la floradon de dramarto. Ju pli multe organiziĝis dramtrupoj, des pli akre sentiĝis la bezono de novaj dramverkistoj. Tial grandaj dramverkistoj kiaj Guan Han-qing k.a. verkis novajn dramojn de tempo al tempo seninterrompe, por kontentigi la bezonojn de la dramtrupoj kaj teatroj. Dum la regado de la mongoloj, la sistemo de "oficistiĝo tra ŝtatekzameno", la rekta vojo de ŝtatoficistiĝo por instruituloj, jam ne plu ekzistis. La inteligentuloj, kies kapablo kaj scio jam ne plu povis "vendiĝi al la imperiestro", estis devigitaj sin servigi al la vasta popolo, skribante por sia vivtenado dramojn, novelojn aŭ aliajn popularajn literaturaĵojn, kiujn la popolo bezonis. Tiu ĉi grandega ŝanĝo bone klarigas, kial tiom da verkistoj en Yuan-dinastio sin okupis en dramverkado.

Post 1279, multege da mongoloj kaj aliaj norduloj migris suden, kunportante *zaju* kiel taŭĝan amuzajon por sin distri. Tiamaniere *zaju* disvastiĝis tra la tuta lando kaj la loĝantoj en la suda Ĉinio ankaŭ iom post iom ekŝatis tiun ĉi novan dramformon. Eĉ la sudaj verkistoj ekimitis tiun ĉi dramformon en sia verkado. Kompreneble, al la sudo ankaŭ senĉese vojaĝis multaj nordaj dramverkistoj. Por kontentigi la bezonojn de la dramtrupoj, ili ankaŭ verkadis novajn dramojn. Sekve antaŭenpuŝiĝis landskale en Ĉinio drama movado, kaj aperis mirinda spektaklo, en kiu "rivale floras cent floroj kaj konkure kantas cent birdoj".

III

GUAN Han-qing bone konis teatrajn teknikojn. Oni diras, ke iam li estis kuracisto,

kio havigis al li sufiĉe multajn ŝancojn por sperti kaj observi la socian vivon. Lia dramaturgia genio ebligis al li utiligi la materialojn akiritajn per longtempa observado en siaj dramverkadoj. Trafe kaptante la karakterizaĵojn de tiu neordinara socio, Guan ilin enkorpiĝis en siajn senmortajn dramverkadojn. En tiu ĉi periodo, malgraŭ ke la ekonomiaj ŝarĝoj de la kamparanoj kaj metiistoj estis iom malpezigitaj dum certa tempo, tamen ili ankoraŭ devis elporti kruelan kaj pezan subpremon politikan. La mongolaj kaj tartaraj ŝtatoficistoj, kiuj scipovis nek paroli nek legi la ĉinan lingvon, ĉefe dependis de la interpretistoj aŭ asistantoj por plenumi sian oficon. Supozeble tiam regis senprecedenta mallumo politika. Plie, la socia pozicio

de la komercistoj subite multe plialtiĝis. La nenion farantaj kaj popolon subpremantaj mongoloj agis kiel privilegiitaj aristokratoj kaj ili faris multe da maljustaĵoj. Ĉio ĉi tio pliigis la indignon kaj kontraŭstaron de la popolo kaj la grandaj dramverkistoj inkluzive Guan Han-qing. Tiajn subjekto-materialojn adaptis multaj el la grandaj dramverkistoj al historiaj dramoj, kiujn ili transdonis al siaj konataj dramtrupoj por prezentado. La vasta popolamaso bezonis tiajn dramojn, ĉar la prezentado de ili estis samtempe distrado kaj politika propagando en plena akordo kun la sentimentoj de la vasta popolamaso. Tiamaniere niaj dramverkistoj starigis interrilaton intiman kvazaŭ inter sango kaj karno kun la popolo. Guan Han-qing estas la unua verkisto, kiu kreis tiajn dramojn en tia neordinara periodo, kaj ankaŭ estas la plej granda en verkado de tiaj dramoj. Iuj el la roluloj de liaj verkoj portis la nomojn de personoj en Jin-dinastio (265-420 p. K.) aŭ Song-dinastio (960-1279 p. K.), sed efektive ili ĉiuj estis liaj vivantaj samtempuloj, kiuj, dank' al lia plumo, restas ĝis nun ankoraŭ vivaj en la dramverkoj aŭ sur la scenejo.

Guan Han-qing estis tre lerta en priskribado de virinoj. En multaj el la verkoj de Guan, la ĉefroluloj estis virinoj — eble tiam la ĉefaj ludantoj en la dramtrupoj estis aktorinoj. La virinaj ĉefroluloj priskribitaj de li estis diversspecaj: malriĉa juna bofilino kondamnita kaŭze de maljusta juĝado, kaj povanta trovi neniun lokon por plendi; pasia, amintrigema junulino; maljuna virino en akra konflikto inter racio kaj amo pro ofero de sia filo; publikulino, kiu per tuta sia ingenieco elsavis sian kompatindan kunulinon; bela edzino, kiu preĝadas al la luno sopirante al sia longe disigita edzo; gejunuloj arde amantaj unu la alian, kiuj finfine geedziĝis trapasinte ĉiajn obstaklojn; juna kaj lerta virino, kiu savis la vivon de sia edzo ruze trompinte protokanajlon; junulino, kiun oni trompis en nevolan edziniĝon, sed post komplika intrigo de la dramo fine repaciĝis kun la edzo; virino, kiu eĉ fariĝinte fantomo helpis sian amaton eliĝi el malliberejo; eksprostituitino, kiu atendas la revenon de sia edzo sub la protektado de honesta amiko, ktp. La diversaj ĉefrolulinoj aŭ tragediaj aŭ komediaj, estas ĉiuj priskribitaj vivaj

kaj kortuŝaj. Guan Han-qing superis multajn grandajn verkistojn ĉinajn en la arto per kiu li priskribis tiom da virinoj malsamaj en deveno, karaktero, vivo kaj aĝo tiel aŭtentikaj, tamen laŭ ĉies propra personeco sen ia ajn simileco unu kun la alia. Kun tia profundeco kaj subtileco li pentris sian epokon kaj diversspecajn figurojn de tiu epoko. En siaj dramoj li planis post zorga cerbumado la intrigon tiamaniere, ke ilia drama efiko atingu la plej altan kulminon. Liaj verkoj povas la rigardantaron jen ridigi, jen plorigi, jen enpensigi, jen indignigi kaj jen plezurigi.

“Somermiza Neĝo” estas la plej elstara el liaj tragedioj. Ĝi rakontas pri iu juna virino Dou E, kiu, pro tio ke ŝia patro ŝuldas kelkajn taelojn da arĝento al S-ino Cai, estis sendita al la hejmo de Cai kiel infan-bofilino*. Malfeliĉe ŝia edzo mortas. S-ino Cai poste edzigas al si Maljunulon Zhang, kies filo Zhan Lü-er volas edziĝi al Dou E, sed ŝi decideme rifuzas lin. Por atingi sian celon Lü-er aĉetas venenon, intencante mortigi la duonpatrinon, sed li erare venenmortigis sian patron. Li procesas kontraŭ Dou E al la guberniestro, false akuzante ŝin pri la mortigo de lia patro. La sencerba juĝisto ŝin kondamnas al morto. Nenie la maljuste kondamnita Dou E povas prezenti sian plendon. Kiam ŝi estas mortigota, ŝi deklaras antaŭ la publiko, ke ŝi estas senkulpa. Ŝi antaŭdiras, ke ŝia sango surŝprucos sur dekdu futojn longan blankan tolon, neĝegos en la varmega somermezo kaj okazos senpluveco por tri jaroj en tiu loko pro la maljusta ekzekuto. Efektive la maljustaĵo kaŭzas strangajn fenomenojn de la naturo kaj efektiviĝas ŝiaj antaŭdiroj unu post la alia. Poste ŝia patro fariĝas oficisto kaj venĝas ŝin. La forta volo de Dou E, kiu ne submetiĝas al

Lordo Guan Yu Iras Sola al Festeno

Foto de Wu Hua-xue



NI faris eksterordinaran viziton al la malgranda kaj malproksima gubernio Huichuan en Gansu-provinco. Tio, kion ni tie aŭdis kaj vidis en pli ol unu semajno klare montris al ni ke sekve de la alta tajdo de akvokonserva konstruado kaj akumulado de sterko en la kamparo, uragane disvolviĝas nova kampanjo de industria konstruado en la montaro kaj la kamparo.

La Espero de Kamparanoj

Huichuan-gubernio, situanta en la sudokcidenta parto de Gansu-provinco, vastas je 2,000 kvadrataj kilometroj, sed havas nur cent milojn da loĝantoj — vasta tero kun maldensa loĝantaro, sed riĉa produkto. En tiu ĉi loko pluvo estas abunda; ok riveroj fluas tra la tuta teritorio. La montodeklivojn kovras fekunda nigra tero produktanta grenojn kaj oleo- kaj fibro-produktantajn kreskajojn. En la pasinteco pro manko de laborforto, oni kulturis betojn, nur per simpla disŝuto de semoj farante nek sterkadon, nek irigacion, nek sarkadon de herbaĉoj, temen la plej alta rikolto ankoraŭ povis atingi mil kilogramojn da beto po muo. En la suda parto, sur la grandaj kaj altaj montoj maro da densaj arbaroj kaj ĉie vivas cervoj, moskiferoj kaj aliaj maloftaj kaj altvaloraj birdoj kaj bestoj. En Tao-rivero kaj Manba-rivero multe produktiĝas sablooro.

Antaŭe pro manko de loka industrio multe da altvaloraj materialoj ne estis bone utiligitaj. Ekzemple, en Huichuan-gubernio multe produktiĝis lino. Ĉar en la pasinteco ne ekzistis linpreparo,

perforto, reprezentas la fortikan kaj nesubigeblan spiriton de la ĉina popolo en tiu epoko. Ŝia maljusta mortigo plene malkovras la maljustigan subpremon kaj doloron suferatajn de la popolo en tiu malluma epoko.

“La Songŝo pri Papilioj” estas tragedikomedio. La edzo de Maljunulino Wang estas mortigata de nobelo Ge Biao. Ŝiaj tri filoj venĝas sian patron per la mortigo de la murdisto. Kiam prefekto Bao dekretas, ke unu el la filoj devas repagi lian vivon, ĉiuj tri sin proponas por la mortpuno. S-ro Bao ordonas, ke Maljunulino Wang decidu, kiu el ili donu sian vivon pro la krimo. Ĉar la du pliaĝaj estas filoj de la antaŭa edzino de la edzo, kaj la tria estas ŝia propra naskito, nur post konflikto inter racio kaj amo fine ŝi decidas oferi sian propran filon. Iunokte, kiam ŝi kun siaj du aliaj filoj iras al la malantaŭa parto de la malliberejo por preni la kadavron de la tria filo, anstataŭ mortinto ili renkontas neatendite la filon vivantan kaj ridetantan, ĉar S-ro Bao jam pardonas lin, ansta-

Guo Feng-xiang kaj Sun Jing:

Industrio en

la linkulturistoj devis prepari linon permane, kaj malprofiti de la temporaba laboro, tial multaj uzis la lintrunketojn kiel hejtajon. Ekde la jaro 1947 ĉi-tieaj kampanoj plantadas beton. Ĉar tie ekzistis nenia sukerfabriko la betokulturistoj devis mem prove fabriki sukeron el beto. Post plurfojaj malsukcesoj, oni povis nur formangi siajn betojn kiel ordinarajn legomojn, kaj dume ili devis aĉeti sukeron aliloke.

Post la liberiĝo, rapide disvolviĝas la agrikulturo de Huichuan-gubernio, kaj samtempe ĉiam pli akre sentiĝas la bezono de industria subteno. La kampanoj opinias, ke la alta tajdo de agrikultura disvolvo postulas industriajn konstruon en la kamparo kaj montaro, kaj malgrandaj fabrikoj devas esti konstruitaj en la kamparo por ĝustatempe provizi la terkulturistojn per produktiloj kaj vivbezonoj.

La Unuaj Fabrikoj en la Montaro

Nun ilia espero ekefektiviĝas. Preskaŭ en ĉiu vilaĝo establiĝas fabrikoj. Ĉie sur la muroj de la simplaj kamparaj domoj, ni povas vidi montrotabulojn de preparaj komitatoj por konstruado de tiaj aŭ aliaj fabrikoj. Eksplozoj aŭdiĝas de

taŭigante lin per ĉevalŝtelisto. La rakonto esprimas la sopiron de la popolo por justa kaj sentima oficisto kia Bao Zheng, kiu protektas la popolon kontraŭ la potenculoj. Ke multaj el la dramoj de Yuan-dinastio priskribas la justajn farojn de S-ro Bao, eble rezultiĝis tiu arda deziro.

“La Riverborda Pavilono”, alia dramo de Guan Han-qing, prezentas malbonkonduktan oficiston Nobelido Jang, kiu, malsukcesinte edzinigi al si belan vidvinon Tan Ji-er, intencas insidi ŝian novan edzon. Dank’ al la lerteco de Tan Ji-er, kiu sin alivestis fiŝistino kaj ŝtelis la oran tabuleton kaj glavon de aŭtoritato per kiuj la senkora oficisto intencis aresti kaj ekzekuti ŝian edzon. Tiamaniere ŝi savis lian vivon. Tio estas tipa de multaj dramoj pri koruptaj oficistoj kaj senkulpaj civitanoj maljuste akuzitaj.

Guan Han-qing estis ne nur lerta en priskribado de virinoj, sed ankaŭ sperta en priskribado de bravaj herooj. “Lordo Guan Yu Iras Sola al Festeno” estas unu el la tre malmultaj dramoj de

la Montarojn

tempo al tempo en montoj — la bravaj kamparanoj foreksplodas la rokegojn por konduki akvon sur la montojn. Ĉe la montpiedoj kamparanoj reformas ordinarajn domojn en fabrikojn. Kiam kamparanoj renkontiĝas survoje, ili interparolas ofte kiel jene: “Kiam ekiros via or-lavejo?” “Baldaŭ, kaj kiom da fabrikoj establiĝos en via vilaĝo tiun ĉi jaron?” Responde al la entuziasmo en produktado de la kamparanoj, la gubernia komitato de la Ĉina Kompartio ĵus fondis Fakon de Industrio por kontroli la disvolviĝon de industrio en la tuta gubernio.

Por laŭeble plej rapide funkciigi la fabrikojn per minimuma investo oni adoptis en tiu gubernio la principon de “laŭebla utiligo de la ekzistantaj malnovaj rimedoj” kaj “produktado unue, konstruado poste”. Nur en iom pli ol unu monato oni jam ekfunkciigis pulvofarejojn, brikofarejojn, linpri-laborejojn kaj aliajn entute ok fabrikojn.

Plua Disvolviĝo


Por la plua disvolviĝo, la gubernia komitato de la Ĉina Kompartio kunvokis kvar kunvenojn por esplori la materialajn kaj teknikajn kondiĉojn.

Yuan-dinastio, kiujn oni ankoraŭ ludas sur la hodiaŭaj scenejoj. En tiu ĉi verko la sentima heroeco de Guan Yu estas bone prezentata.

Ĉijare ni rememorigas Guan Han-qing, kiu verkis tiujn grandajn dramverkojn antaŭ 700 jaroj. Ni tributas al li ne nur pro tio, ke li estis granda dramverkisto kaj ke li kreis la dramformon de *zaju*, sed ankaŭ pro tio, ke li estis verkisto plej intima al la popolo. Li akuzis por la popolo la tiaman malluman regadon; li verkis por la popolo. Li havis karno-kaj-sangan interrilaton kun la popolo kaj kunspiris kun ili. La ĝojoj kaj malĝojoj de la popolo estis ankaŭ la liaj, kaj li lasis al ni senmortan priskribon pri la amoj, timoj kaj aspireroj de la popolo.

Tradukis Pandiŝo

* *Knabino ne plenkreskinta, kiu pro la malriĉeco de siaj gepatroj vivas kaj laboras en la hejmo de sia estonta edzo.*



Ankaŭ en Xuanhua, Hebei-provinco, konstruiĝas malgrandaj fandfornegoj

Foto de Shi Pan-qi


Post interkonsiliĝado estis decidite, ke dum tiu ĉi jaro establiĝos sukerfabriko, farunfarejo, paperfabriko, orproduktejo, linpreparejo, ktp. entute 75 fabrikoj malgrandaj, kaj tiam ĉiu distrikto havos sian fabriketon. Laŭ ilia antaŭkalkulo ili ne nur povos regajni, en tiu ĉi jaro, la tutan investan sumon de la unua etapo de konstruado, sed ankaŭ akumuli kapitalon por grandigi kaj mekanikigi la fabrikojn.

Ciuj fabrikoj uzas nur lokajn materialojn, kaj la plejparto de la produktaĵoj ankaŭ estas loke konsumita. Ekzemple, la loka natura kondiĉo konvenas al sukera industrio, tial oni decidis establi en tiu ĉi jaro 12 malnovtipajn sukerpreparejojn; kaj cetere fabrikon de enladigita lardo oni decidis konstrui certiginte pri tio ke en Tianjin kaj aliaj lokoj tiaj produktaĵoj estas bezonataj kaj elvendebaj.

La Forto de la Amaso

En la pasinteco la loka industrio dependis sole de la ŝtata investado. Konsekvence, ĝi ne povis ĝenerale disvolviĝi. Nun sub la gvido de la devizo “mobilizu la fortojn de la amaso”, en la tuta gubernio leviĝis alta tajdo de kapital-kolektado. En Puli-distrikto kun 407 familioj, 39,000 jŭanoj jam kolektiĝis nur en iom pli ol unu monato — meznombro preskaŭ 100 jŭanoj po familio.

(Daŭrigo sur p. 82)



La larĝaj granitaj digoj interligas la kontinenton kaj la insulon

Foto de Ni Hai

La Yingtan-Xiamen-a Fervojo, kiu ligas Yingtan en Jiangxi-provinco sur la Zhejiang-Jiangxi-a Fervojo kun Xiamen en Fujian-provinco, estis finkonstruita kaj malfermita al trafiko tra la tuta linio je la unua de januaro, 1958.

Ĉi tiu fervojo, longa je 697.72 kilometroj, trapasas grandajn montarojn kun altaj krutajoj kaj torentaj riveretoj, transiras tumulte ondiĝantan markolon kaj finfine atingas nian bonan komercan havenon — Xiamen-insulon. Ĝi realigis 50-jaran aspiron de la popolo de Fujian-provinco.

Malĝojiga Rakonto pri Pasintaĵo

Rilate al konstruo de fervojoj la Fujian-anoj vole-nevole ekmemoras pri malĝojiga pasintaĵo. Jam antaŭ kvindek jaroj ili deziris konstrui fervojojn en sia hejmlando, por solvi la problemon de malfacila komunikado, ekspluati la naturriĉaĵojn kaj disvolvi la ekonomion de sia patrio. Sed la koruptaj reaciaj regantoj profitis la noblan aspiron, kiel okazon por trompe elpremadi monon el la poŝoj de la popolo, por sin riĉigi per diversaj malhonestaj rimedoj. Ekde la jaro 1906, dum 7 plenaj jaroj estis kolektita la t. n. "fervoja imposto". Grandajn sumojn la popolo pagis, sed konstruiĝis nur mallonga linio je malpli ol 28 kilometroj, nomata Zhangzhou-Xiamen-a Fervojo, kiu atingis nek Zhangzhou, nek Xiamen, kaj funkciis nur mallongan tempon. Kvankam kelkfoje iam kuris vagonaro, tamen ĉiutage la pasaĝeroj estis malpli ol kvardek kaj la ŝarĝo malpli ol 1,000 kilogramoj. Kaj la vagonaro iris ege malrapide. Eĉ tia fervojo estis devigita ĉesigi sian servon antaŭ 27 jaroj, pro subpremado kaj ekspluatado de la reacia registaro. Finfine, kiam la lastaj ŝtalreloj kaj reltraboj estis ŝtelvenditaj, eĉ la grundo de stacidomo estis vendita al la Usona Standarda Olekompanio. De tiam tute vaporiĝis la espero de Fujian-anoj konstrui fervojojn.

Kaj hodiaŭ la Yingtan-Xiamen-a Fervojo finfine konstruiĝis. Kia ĝojekstazo por la Fujian-anoj kaj la popolo de la tuta lando!

Montaro post Montaro Traborita

La ĉefaj konstruaj laboroj de la fervojo komenciĝis en februaro, 1955. Nelonge poste, oni sin trovis antaŭ la unua grava tasko sur la linio—

la konstruado de tunelo tra Dahe-monto, la tiel nomata "gorĝo de Yintang-Xiamen-a Fervojo". La tunelo, 1460 metrojn longa, troviĝas en la montoregiono Wuyi, kiu estas la akvodisiga montaro inter Fujian kaj Jiangxi. Ordinare, traborado de tia tunelo bezonus 20 monatojn, kaj eĉ laŭ progre-

Jang Yun-ji :

Tra Montoj trans

sinta normo, almenaŭ unu jaron. Krome, la roko ĉi tie estas de tre malmola speco — la granito. Laŭ la plano oni devis ĉiutage enfosi 2.5 metrojn. Sed oni sukcesis enbori nur malpli ol unu metro potage. Tio renversis la tutan planon. Kaj tute nebuliĝis la dato de finkonstruiĝo de la fervojo. Tamen tiuj malfacilaĵoj ne timigis la harditajn de bataloj fervoj-soldatojn kaj la fervorajn civilajn laborantojn. Ili per komuna penado altigis la rapidecon de enfosado, iom post iom, de malpli ol 1 metro ĝis 8.9 metroj po-tage, kaj dum la lastaj tagoj antaŭ la fina traboro, la meznombra potaga rapideco atingis 9.4 metrojn, kun la plej alta rekordo je 34.05 metroj. Tiamaniere, la tunelo de Dahe-monto kompletiĝis je 5 monatoj pli frue ol la difinita dato.

Pli kompleksa ol la topografio de Wuyi-monta regiono estas tio de Daiyun-monta regiono — la akvodisiga montaro inter la norda kaj suda partoj de Fujian-provinco kaj la koro de la Yingtan-Xiamen-a Fervojo. Oni devis fortranĉi montpintojn, plenigi valojn kaj foreksplodigi krutegaĵojn. Unu el la ĉefaj konstruejoj lokiĝis en Gongziwan, kie, en spaco de unu kilometro, oni devis ebenigi kvar montpintojn, plenigi tri valojn kun profundeco de preskaŭ 40 metroj: nur la tero kaj roko forfosita

kaj enplenigita sumiĝis je 640 mil kubmetroj. Ie, la krutegajojn ne povis surgrimpi eĉ simioj, sed la heroaj batalantoj kaj laborantoj pendigis sin ĉe montodeklivo per ŝnuroj, kun unu piedo sur la rokangulo kaj la alia en la aero, kaj persiste prilaboris daŭre en tia pozo. Pioĉon post pioĉo ili elfosis fundamenton por la fervojo sur montoj kaj krutegajoj, cent kilometrojn super la fundo de valo.

Vagonaro Transiras la Maron

Niaj antikvaj mitoj ofte menciis pri “ĉielaj soldatoj kaj diaj generaloj”, “fortuloj kaj gigantoj”, kiuj povis movi montojn kaj plenigi marojn. Tiuj mitoj esprimis la fortan deziron de niaj prapatroj, subigi la naturon. Kaj nuntempe estas epoko, en kiu mitoj fariĝas realaĵo. Krom 47 tuneloj, 155 pontoj kaj 1592 akvokondukiloj, niaj heroaj de la fervojkonstruado per siaj propraj manoj konstruis du 5-kilometrajn digojn tra la ondiĝanta Xiamen-markolo — Xiamen-digo kaj Jimei-digo, kunligante eterne la insulon Xiamen kun la kontinenta patrolando. Vagonaroj nun transiras la muĝantan maron laŭlonge de la manfaritaj ĉielarkoj al Xiamen.

Markolo al Xiamen

Kiam komenciĝis la konstruado de la mar-digoj, multaj ne havis sufiĉe da fido, iuj eĉ havis grandan dubon pensante, ke “la ĉielo estas senlima, la maro senfunda”, plej probable la klopodo estos vana, kiel ŝtono ĵetita en la maron. Sed nun, faktoj faris al ili la plej elokventan respondon.

Certe, konstruado de kelk-kilometraj digoj sur maro kun profundeco de kelkdek metroj ne estis afero facila, precipe kiam oni devis tion fari nur per la du manoj, sen helpo de maŝinoj. Sed la forto kaj saĝo de la popolamaso ĉiam triumfas. Kiam ĉiuj rokoj el najbaraj montoj kaj sur senhomaj insuloj ne sufiĉis por ŝtopi la markolon, oni komencis grandskale elfosi la subterajn rokojn. Kiam malgranda eksplodigo ne efikis, oni faris grandan. En truegoj profundaj je kelkdek futoj oni enmetis centojn da kilogramoj da dinamito. Unu tia eksplodigo sendis el sub la tero multajn grandajn rokojn, kiuj estis transportitaj al la konstruejoj per ŝarĝveturiloj kaj boatoj. Nek la malhelpo de la aeroplanoj kaj kanonoj de Jiang Gai-shek, nek frapado de la ondegaj maroj, nek la atako de uraganoj povis malhelpi progreson de la konstrua laboro. Niaj heroaj fervoj-konstruantoj finfine venkis ĉiujn danĝerojn kaj obstaklojn, kaj du larĝaj fortikaj digoj firme kuŝas sur la maro.

Ŝanĝiĝas la Fizionomio de Trafikado

La ekfunkcio de la Yingtian-Xiamen-a Fervojo signifas, ke Fujian ne plu estas la nura senfervoja provinco marborda. Kune kun aliaj du baldaŭ konstruotaj fervojoj, kaj ŝoseoj kaj akvo-vojoj, ĝi formas trafikan reton, kovrantan la tutan provincon, precipe interligiĝos la norda kaj suda partoj de Fujian tra mil kilometroj da montaj regionoj. Samtempe, Fujian-provinco estas ankaŭ de nun ligata kun la ceteraj partoj de la lando, ĝi ne plu estas izolita montregiono, ĝia ekonomio grandpaŝe disvolviĝos kaj la vivnivelo de la popolo rapide altiĝos.


Ligno, Bambuo kaj Fruktoj

Fujian estas fekunda grundo de diversaj riĉaĵoj. Sed en la pasinteco, la malfacila komunikado malebligis elportadon. Superaĝaj arboj estis lasitaj kadukiĝantaj, vastaj bambuaroj mem elkreskantaj kaj velkantaj, kaj maturaj fruktoj falantaj kaj putriĝantaj surtere. Tia bedaŭrinda stato definitive forpasas.

Nun ŝtataj entreprenoj kaj konstruaj unuoj sendas siajn aĉetantojn al Fujian por la bezonataj ligno kaj bambuoj. La prezoj de fabrikitaj produktajoj el aliaj provincoj multe malaltiĝis. Kun la disvolviĝo de komunikado kaj transportado, aperas ankaŭ novaj industriaj urboj. Ekz. Nanping, grava stacio en norda Fujian, kreskiĝas iom post

(Daŭrigo sur p. 83)

Tra la montoj . . .



En Xigou-distrikto, kamparanino He Rui-ying ankaŭ donis siajn 4 arĝentajn dolarojn kiujn ŝi konservadis en solida paketo de tiam, kiam ŝi edziniĝis antaŭ dek jaroj. Multaj familioj donis siajn neloĝatajn domojn por laborejoj. En Zhongzhaij-distrikto, kiam oni informiĝis pri bezono de kelkdek kaldronoj por establi sukerfabrikojn en ĉi jaro, oni tuj alliveris siajn neuzatajn kaldronojn. La kolektado de kapitalo fare de la amaso komenciĝis en januaro ĝenerale en la tuta gubernio kaj nur en unu monato kamparanoj ne nur sukcesis kolekti sufiĉan monon por akvokonserva konstruado, sed ankaŭ pli ol 700,000 jŭanojn por disvolvi industrion. Je la 11-a de februaro, la kamparanoj reprezentantoj de ĉiuj distriktoj proponis en sia jurdona kongreso, ke ĉijare la distriktoj kaj kooperativoj investu por ankoraŭ establi kelkdek malgrandajn fabrikojn, kaj tiel garantiu, ke la valoro produktita de industrioj superu tiun produktitan de la agrikulturo en la venonta jaro.

Trad. Ĉen Ĉaŭ-jin.

Manĝu

Lignogravuraĵo de Cao Xing-gao



Wang Da-bo :

La Aspekto de Malnova

IUN helan tagon en printempo, mi vizitis la kolĥozon "Ruĝa Stelo" en la suda antaŭurbo de Pekino. Antaŭ 1911, kiam regis Qing-dinastio, tie estis ĉasejo de la imperiestroj. Sed nun la kamparanoj en tiu loko organiziĝis en kolĥozon kaj nova socialisma kamparo prospere kreskiĝas.

EN LA DISAŬDIGEJO

En la disaŭdigejo de la kolĥozo staris tute nova disaŭdigilo 500 v., uzebla ankaŭ kiel radioricevilo kaj gramofono. Apud ĝi estas novtipa aparato por funkciigi telefonon. La junaj parolistino kaj telefonistino okupiĝis ĉe siaj aparatoj. Regis tie kvieto kaj lumo.

Mi trovis la prezidanton de la kolĥozo Yu Chao-kai en tiu ĉi ĉambro. Li okupiĝas por informiĝo de la labor-grupoj, pri la nombro de laborantoj en tiu tago. Nia konversacio komenciĝis de la modernaj instalaĵoj. Li sciigis al mi, ke tiu disaŭdigejo estas starigita en la jaro 1956, kiam la kolĥozo pligrandiĝis. Ankaŭ la disaŭdigilo estas tiam aĉetita. En la tuta kolĥozo troviĝas 19 produkto-grupoj kaj la tereno ampleksas pli ol 20 vilaĝetojn. Ĉiu produkto-grupo havas sian telefonaparaton kaj ĉiu vilaĝeto sian megafonon. Tio multe faciligas la organizadon kaj tujan informiĝon pri la laboroj.

Montrante la vastan kamparon ekster la fenestro, li diris kun emocio: "Nun ĉiuj vilaĝetoj de la kolĥozo povas aŭdi nian interparolon. Ni konstruas promesplenan novan kamparon, sed en la pasinteco tiu ĉi loko estis ĉie kovrita de sovaĝaj herboj, troviĝis apenaŭ kelkaj domoj, ĉar neniu volis vivi ĉi tie!"

LA ĈASEJO DE IMPERIESTROJ

La grundo de la kolĥozo etendiĝas 10 kilometrojn de nordo ĝis sudo kaj 20 kilometrojn de oriento ĝis okcidento. Ĉirkaŭ 60 jaroj antaŭe, tiu loko estis ĉirkaŭita de dikaj muroj kaj kvar gardataj pordegoj je la kvar flankoj. Sur la kelkdek miloj da muoj ĉirkaŭitaj de la muroj abundis sovaĝaj kreskajoj, kaj libere vivis tie miloj da kaproj, cervoj, bovoj, ĉevaloj kaj aliaj brutoj kaj birdoj. La tereno estis rezervita ekskluzive por la ĉasado kaj plezuro de la imperiestroj. Eĉ nun, nomoj de vilaĝetoj, ekz. "La Granda Ruĝa Pordego", "La Malnova Palaco" k. a. vekas memoron pri la historio de tiu ĉi loko. Sed nun

Imperia Ĉasejo

mi vidas nur riĉajn kampojn etendiĝantajn ĝis la horizonto, la fumojn el la kamentuboj de la densaj vilaĝ-domoj, la ŝarĝo-veturilojn kaj omnibusojn rapidantajn sur la vojo.


MALRIĈA LANDO SEN VIRINOJ

Dum la lastaj jaroj de Qing-dinastio, la feŭdala reĝimo dekadenciĝis, kaj tiu loko fariĝis ankoraŭ pli forlasita. Finfine la imperiestro ĝin forvendis al la oficiroj, komercistoj, procentegistoj. Iuj el la novaj terposedantoj komisiis sian intendanton kulturi la teron per dungitaj laboristoj kaj mem loĝis en la urbo ĝuante la profiton; aliaj luigis sian bienon por ricevi renton. La luantoj dividis la bienon en malgrandajn pecojn kaj siavice luigis ilin al malriĉaj kamparanoj je pli peza lupago. La terkulturistoj devis suferi la duoblan ekspluatadon, kaj tiel la loĝantoj ĉi tie konsistis nur el viroj laborkapablaj kaj troviĝis preskaŭ neniuj virinoj. Kiel diris avo Wang Yu-shan, 77-jara aĝulo, kiu transloĝis ĉi tien el Tianjin antaŭ 56 jaroj, en tiu tempo li ne vidis eĉ unu virinon, ĉar ja kiu virino volis vivi en tia mizera loko!

PROSPERA LANDO HODIAŬ

En la jaro 1955, establiĝis ĉi tie agrikultura kooperativo. Ĝin partoprenis 63 familioj. La sekvanta jaron, la kooperativo pligrandiĝis kaj reorganizis en kolĥozon "Ruĝa Stelo". Nun ĝia membraro konsistas el 2,592 familioj kun pli ol 10,000 loĝantoj. Ĝi havas pli ol 50,000 muojn da agro. Tiu loko, kiu spertis diversajn ŝanĝojn dum la pasintaj jardekoj — la ekspluatado de feŭdala militistoj, la invado de japanaj imperialistoj, la subpremado de la Kuomintang-aj reakciuloj . . . — nur nun en la nova Ĉinio forskuis la mizeron kaj transformiĝis en prosperan landon.

La kolĥozo posedas 9 traktorojn (kun kompletaj agrikulturaj instrumentoj), 1 rikolt-maŝinon, 200 kulturilojn novtipajn, 5 herbotranĉajn maŝinojn, 33 durada-duklingajn plugilojn, 6 ŝarĝaŭtojn. La tuta proceso de kulturado ekde plugo ĝis semado estas mekanikizita. La rikoltado de tritiko estas farita ankaŭ per maŝino, nur rizon oni rikoltas ankoraŭ permane. Por irigacio, 76 elektraj pumpiloj estas en dispono kaj ankaŭ 43 putoj kun elektraj ekipaĵoj. Krome la kolĥozo starigis diversajn bredejojn por laktobovinoj, porkoj, kokoj kaj kunikloj, kaj kulturadas en granda nombro bestojn kaj kortobirdojn, kiuj estas distribuataj al la kolĥozanoj por bredado.



Kie estas la lastjara arbo?

de Wei Qi-mei

La enspezoj de la membroj pligrandiĝis en la jaro 1957 je 150% kompare kun tiu de la jaro 1956. Ĉiu familio de la kolĥozo nun havas superfluan grenon, ĉiuj membroj havas sufiĉajn nutraĵojn kaj vestojn. Sole en la pasinta jaro, 360 familioj konstruis por si novan domon, kaj plimultaj riparigis aŭ renovigis siajn loĝejojn.

Trad. Sumo

(Daŭrigo de p. 81)

iom, kiel urbo de arbara kaj ĥemia industrioj. En aliaj urboj kaj urbetoj apud la fervojo konstruiĝas ankaŭ multaj fabrikoj kaj butikoj. La kamparanoj ekhavas grandegajn interesojn pri kulturado de virga tero, arbaroj kaj bambuoj. Virgaj teroj kaj montoj estas nun vaste kulturataj. Frukto-kulturistoj en suda Fujian ne plu timas pri neelvendebleco de siaj produktoj. Ĉiuj agrikulturaj kooperativoj faras perspektivajn projektojn pri produkto de pli multaj kaj pli bonaj fruktoj, kiuj estos transportataj tra la fervojo al diversaj lokoj de la patrolando kaj amikaj landoj.

Trad. Censinio



TIUJ, kiuj unuafoje vizitas la centran regionon de Gansu-provinco, certe miras pri tio, ke ĉiuj kampoj estas plenplenaj de ovalaj ŝtonetoj. Ĉu tio estas dezerto? Ne, ili estas la t. n. gruzo-kampoj de Gansu-provinco. Ili estas genia kreaĵo de lokaj kamparanoj en batalo kontraŭ trosekeco. Gruzo-kampo estas kampo kovrata de 10 centimetrojn dika tavolo de ŝtonetoj kaj gruzoj. La grenplantoj en tiuj kampoj elŝovas siajn tigojn tra la gruzo tavolo, kaj bone enradikiĝas en la sube troviĝanta tero. Tiu metodo por konservi la humidecon de la tero kaj kontraŭbatali sekecon, ege vastigis la kultureblan areon en Gansu-provinco kaj altigis la produktivon por area unuo.

Jam estas malfacile trovi kiam oni elpensis tiun kulturan metodon. Sed oni povas aserti, ke ĝi ekzistas jam de pli ol cent jaroj laŭ esplorado pri la malnovaj gruzo-kampoj. Oni rakontas, ke en la mezo de Qing-dinastio (t.e. ĉirkaŭ la 18-a jarcento) okazis granda sekeco en Gansu-provinco kaj daŭris plurajn jarojn. Tiam sur la vastaj kampoj troviĝis nenia verdaĵo. Hazarde iu maljuna kamparano trovis sur monta deklivo kelkajn grenplantojn bone kreskantajn kun dikaj spikoj. Li zorge esploris kaj trovis, ke tiuj grenoj kreskas sur gruzamaseto, kiun formis ratoj per la gruzoj elfositaj el siaj kavoj. Li forigis la gruzamason kaj trovis la suban teron sufiĉe humida. Subite li komprenis la kontraŭsekan efikon de gruzo tavolo.

Baldaŭ poste li provis surmeti gruzan tavolon sur siajn kampojn. Tio vere bone efikis al la kreskado de la grenoj. Ekde tiam la kamparanoj en tiu loko plibonigis tiun ĉi metodon kaj ĝin vastigis en ĉirkaŭaj gubernioj.

Post la liberiĝo de Ĉinio agronomoj pristudis tiun metodon kaj konstatis ke ĝi plene konformas al sciencaj principoj: Ĉar 1-e, la temperaturo de la tero sub la gruzoj malmulte ŝanĝiĝas inter la

tago kaj nokto kaj post tag-post-taga konservado de varmeo la temperaturo estas iom pli alta ol tiu de nudaj kampoj. Tio donas bonan efikon al la kreskado de la radikoj. 2-e, la maldensa gruzo tavolo malebligas kapilaran funkcion de la grundo kaj leviĝon kaj vaporigon de la humideco, kaj krome la gruzo tavolo ŝirmas la teron kontraŭ la suno kaj la vento, kio ankaŭ malpliigis la forvaporigon. Krome la maldensa gruzo tavolo povas enlasi ĉiom da pluvakvo ke ĝi ensorbiĝu en la teron kaj ne forfluu de la

Li Zhi - zhong :

Lernejo por Kulturi Ka

EN antaŭurbo de Zhengzhou estas elementa lernejo nomata Dongshima. Tie tage lernas multaj infanoj kun ruĝaj tukoj ĉirkaŭ la kolo, sed nokte en la klasĉambro sidas jam ne infanoj sed kamparanoj el diversaj laborgrupoj kiuj finis sian taglaboron kaj nun lernas en sia Dongshima Libertempa Mezlernejo por Kamparanoj.

Dongshima-vilaĝo produktas kotonon kaj tie, la vivo de la popolamaso estas pli malpli riĉa. Dum lastaj jaroj, pli ol dudek junuloj jam likvidis sian analfabetecon post vizitado al libertempa popollernejo. Inter ili dekkelkaj estas ŝarĝitaj per administraj laboroj en la agrikultura kooperativo. Pro la malalta nivelo en klereco, ili renkontadas multajn malfacilaĵojn en sia laboro. Kvankam ili daŭre mem lernas, sed ĉiuj aspiras ricevi helpon de instruisto. Somere de 1956, en la vilaĝo partoprenis la kooperativon pluraj gradigitaj el elementa ler-

surfaco. Tio ankaŭ utilas al la kreskado de la plantoj. 3-e, ĉar la gruzoj malebligas la kapilaran funkcion kaj malpliigas la leviĝon de subtera akvo, tio ankaŭ malpliigas la leviĝon de subtera salosolvaĵo kaj malhelpas la sal-alkaliĝo de la surfaca tero. 4-e, la gruzoj povas malhelpi ankaŭ la kreskadon de sovaĝaj herboj kaj forlaviĝon de tero.

La klimato de Gansu-provinco estas tre seka. La tutjara pluvokvanto en la centra regiono proksimumas nur 300 mm., kaj ĉirkaŭ la komenco de la somero, kiam la grenoj plej bezonas akvon, la pluvokvanto eĉ ne atingas 50 mm. Plie, kelkloke la grundo estas serioze sal-alkala. La tersurfaco ofte blankiĝas de tavolo de alkalo. Ĉio ĉi tio estas granda minaco al la agrikulturo de tiu ĉi regiono. La kultura metodo de gruzo-kampo estas utila ĝuste por venki tiajn katastrofojn.

Tamen fari gruzo-kampojn estas peniga laboro. Tiaj kampoj ordinare funkcias nur 30-60 jarojn, dum kiuj la produktivo pli kaj pli malpliĝas. Kiam la gruzoj tute miksiĝas kun la tero, tiam perdiĝas la funkcio kaj oni devas renovigi la gruzotavolon. Tial estiĝis proverbo pri tiuj kampoj inter la kamparanoj:

La patro mortas de penado,
la filo mortas de trosato,
la nepo mortas de malsato.

Tio plene montras la malfacilon de kampogruzumado sub la feŭda socisistemo. Laŭ statistiko ekde la mezo de Qing-dinastio ĝis la liberiĝo en la tuta Gansu-provinco troviĝis nur ĉirkaŭ 300,000 muoj da gruzo-kampoj, kaj plejparto el ili estas malnova, da kiu eĉ 300 muoj ne sufiĉas por vivteni unu familion.

Post la liberiĝo la registaro pruntedonis grandan sumon da mono al la kamparanoj por disvolvo de gruzo-kampoj. La agrikulturaj instancoj kaj sciencaj organizoj faris detalan esploradon kaj studon. Nun la areo de gruzo-kampoj jam atingis 1,500,000 muojn. Sole en la unua jaro de la koooperiĝo de la kamparanoj, la gruzo-kampoj jam pliiĝis je pli ol 300,000 muoj. La disvastigo de gruzo-kampoj ebligis altan kaj stabilan produktivon al la kampoj sen irigaciaj faciligoj kaj kulturadon de plantoj de alta ekonomia valoro sur sekaj altebenajoj, kaj ankaŭ grandigis la kultur-areon por multaj fruktoj kaj legomoj.

Nun tritiko, kotono jam vaste kreskas en tiu regiono, kie antaŭe kreskis nur herbetoj, eĉ bongustaj piroj, melonoj, grandaj kapsikoj kaj tomatoj produktiĝas tie. Lanzhou, la ĉefurbo de Gansu-provinco eĉ famiĝas tutlande per siaj bonkvalitaj fruktoj.

Trad. Honfan

Kamparajn Intelektulojn

nejo. Ankaŭ tiuj deziris daŭrigi la lernadon. Tiel en la aŭtuno de 1956, la kooperativo decidis fondi libertempan mezlernejon por kamparanoj, utiligante instruajn ekipaĵojn de la elementa lernejo. Krom ses gradigitoj el elementa lernejo, partoprenis ankaŭ la sekretario de la filio de Komunisma Junulara Ligo, laborgrupestroj, produktteknikistoj, entute dek tri en nombro. Profunde koninte la malfacilaĵojn de neklereco en produktado kaj laborado, ili lernas tre fervore kaj persiste ekde la komenco.

Laŭ la principoj de kunligo de lernado kun praktikado, kaj de sistema klerigado, oni malfermis kvar kursojn, t.e. literaturo, matematiko, politiko kaj agrikultura tekniko. Kiel instruistojn oni invitis abiturienton, Ren Chang-ben, kiu laboras en la kooperativo por instrui literaturon; Ren Cheng-ben, kiu laboris antaŭe en artilerio, por instrui matematikon; Ren Jin-hai, la propaganda



Pentrado

GRANDSKALA patriota higiena kampanjo kun ekstermado de la kvar malutilaj bestaĉoj (muso, pasero, muŝo kaj moskito) kiel centro, nun vigle disvolviĝas kaj enpenetras en ĉiujn angulojn tra la tuta Ĉinio.

En Pekino, la loĝantoj ĝin partoprenas kun senprecedenca aktiveco kaj 90 procentoj de la loĝejoj estis plene purigitaj kaj 98 procentoj de ili fariĝis senmuŝaj. Ankaŭ Ŝanhajo, urbo tre multnombre kaj dense loĝata, elmetis bravan devizon: "Fari Ŝanhajon urbo sen la kvar bestaĉoj". La plejparto de la loĝantoj partoprenis la kampanjon higienan; la fabrikoj, lernejoj, institucioj, stratetoj kaj loĝejoj estas bone purigitaj kaj la subteraj etaĝoj de pli ol cent domegoj estas eĉ prifumitaj per 666-pulvoro. Ankaŭ en aliaj urboj kaj la vilaĝoj la kampanjo alte tajdas en plena entuziasmo de la popolamasoj.

Laŭ statistiko de higienaj instancoj, ekde la jarfino de 1957 ĝis februaro, 1958, pli ol 40 milionoj da musoj, 25 milionoj da paseroj kaj granda nombro da muŝoj kaj moskitoj jam estis ekstermitaj en Ĉinio. Tio ja estas plia granda sukceso en higiena laboro, aldone al la brilaj rezultoj jam atingitaj en la pasintaj jaroj.

En la malnova Ĉinio plena de malfeliĉoj kaj plagoj, la popolo vivis tre mizere kaj tute ne eblis al ili zorgi pri higieno. Post la liberigo, pliboniĝis nia vivo, kaj ankaŭ ebligis al ni la modernigo kaj

Tang Zi-ying:

Kampanjo kontraŭ la

higienigo de la vivado. En la jaro 1952, la Popola Registaro jam alvokis al la tuta popolo disvolvi tutlandan patriotan higienan kampanjon; en la jaro 1954, tiu ĉi kampanjo atingis novan stadion, dum kiu la antaŭŝirmo kontraŭ malsanoj kaj plibonigo de la sanstato de la popolo fariĝis ĉiutagaj laboroj. La Provprogramo de la Tutlanda Agrikultura Disvolvo publikigita en 1956 elmetis la plialtajn postulojn, ekstermi en 12 jaroj la 4 bestaĉojn kaj gravajn malsanojn, kiuj minacas la vivon de la popolo. La Reviziita Provprogramo publikigita lastjare eĉ pliprecizigis la taskon.

Rezulte de la popolamasa klopodado en la pasintaj kelkaj jaroj, multe ŝanĝiĝis la higienaj trajtoj de Ĉinio. La fame konataj malpuraj kaj moskitoplenaj Longxugou en Pekino, Wandezhuang en Tianjin k. a. jam fariĝis modelaj distriktoj higienaj. Ankaŭ Hengbin-rivero, antaŭe konata kiel "malbonodora fluaĉo" kaj Jinzhong-rivero, nomita "Plagokvaro" en la du plej grandaj kaj prosperaj urboj de la malnova Ĉinio, Ŝanhajo kaj Tianjin, jam estas dragitaj de la popolamasoj. Pli

komitatano de la subfilio de kompartio en la kooperativo, por instrui politikon; produktteknikiston por instrui agrikulturan teknikon. La lecion-horoj komenciĝas ĉiuvespere post vespermanĝo.

Pri la aranĝo de la instrua programo, ĉefajn lokojn okupas ordinare literaturo kaj matematiko. La enhavojn de la kursoj de politiko kaj produkttekniko oni decidas laŭ la centra laboro kaj postuloj de la produktado en diversaj tempoj. Ekzemple, dum irigaciaj konstruadoj kaj kampanjo por sterko-kolektado, en politikaj lecionoj oni instruas pri la kvardek punktoj de la "Programo de Tutlanda Agrikultura Disvolvado". En la teknikaj lecionoj, oni instruas la teknikajn konojn, strikte ligatajn al la produktsezono, laŭ teknikaj broŝuroj. Ĉar ĉi tie estas la regiono de kotono, oni donas lecionojn pri plantado de kotono en la tempo de kotonplanto; kiam la kotono kreskiĝis, oni donas la lecionojn pri kampa prizorgado de la kotono kaj ekstermado de malutilaj insektoj ktp. Lecionoj pri grundo kaj specoreformado estas ankaŭ donataj laŭ la "Scienc-Teknika Kurso por Henan-aj Kampanoj."

Pri instrua metodo oni kunligas la lecionojn en klasĉambro kun la praktikado sur la kampoj.

Post leciono oni prove praktikas la sciojn en la kampo, celante ekkonon en teorio, scipovon en apliko, kaj praktikadon kaj disvastigadon de la scioj aŭ metodoj en sia laborgrupo. En plialtiĝo de la lastjara produktkvanto de la kotono, la ekposedo kaj disvastigo de nova tekniko pri kotonkulturado ludis grandan rolon.

Ĉar ĉiuj instruistoj estas membroj de la kooperativo kaj loĝas en la vilaĝo, ili laboras kune kun la lernantoj en la tago kaj instruas en la vespero, do, la lernado tute ne malhelpas la produktajn laborojn. Kiam la instruistoj devas prepari lecionojn aŭ korekti ekzercojn, la kooperativo registras al ili laborpoentojn por la okupitaj horoj, same kalkulotaj kaj pagotaj kun la laborpoentoj por produktado. La estro de la elementa lenrejo helpas en pedagogiaj aferoj.

Por faciligi la partoprenon de kooperativaj kunvenoj al la lernantoj, oni kunvenas en la tago aŭ post la tagmanĝo. Kiam urĝa laboro devas esti diskutota en la vespero, oni sciigas la lernejon por doni lecionon pli frue ol kutime. Responde al la bezonoj de produktado, oni havas feriojn dum la laborplenaj kulturaj kaj rikoltaj sezonoj. La tempodaŭro de lernado ĉiuvespere ankaŭ varias laŭ

4 Bestaĉoj

ĝojigaj fenomenoj estas, ke grandnombre aperis vilaĝoj kaj stratoj sen la kvar bestaĉoj. Sole en Jiangsu-provinco jam troviĝas pli ol 3,860 vilaĝoj, urbetoj kaj loĝejpunktoj senigitaj de la kvar bestaĉoj. Ni prenu unu el ili kiel ekzemplon:

La vilaĝo Xinwuwan troviĝas en Huanggang-gubernio, Hubei-provinco. En la pasinteco, tra la vilaĝo sin etendis kvincent futojn longa ŝlima kloako, kaj ĉirkaŭe troviĝis 11 fekajuloj. Ĉiusomere, ĉie naŭzis fetoro, kuris musoj kaj flugis svarme muŝoj, moskitoj kaj paseroj. En julio de la pasinta jaro, kune kun la sterkokolekta kampanjo, oni komencis ankaŭ higienan laboron. En nur kvin tagoj, la 22 malpuraj marĉoj kaj ĉiuj kloakoj jam estis plenigitaj per tero de la vilaĝanoj. Ĉiu loĝejo de la vilaĝo estis purigitaj kaj desinfektitaj per 666-pulvoro; kaj la popolamaso ankaŭ forsarkis la herbaĉojn ĉirkaŭ la vilaĝo. Tiel la muŝoj kaj moskitoj ne plu havas lokon por sin kaŝi. Tuj poste, la loĝantoj faris ĝeneralan atakon al la paseroj kaj musoj por ilin ekstermi. Post tri-monata batalo, fine la kvar bestaĉoj ekstermiĝis. La vilaĝo ankaŭ ellaboris regularon kaj sistemon por konstantigi la

okupateco de la lernantoj, ordinaro du, iutempe unu kaj duona horoj.

Dum unu jaro, la lernantoj streĉe kaj diligente lernadis, kaj rimarkinde levis sian kulturan kaj precipe, la lingvan nivelon. Ren Xin-an, la filia sekretario de Komunisma Junulara Ligo, antaŭe ne kapablis skribi, sed nun jam povas skribi mallongan artikolon en ĉirkaŭ mil vortoj, gramatike korektan kaj signife klaran. Tio multege faciligas lian laboron.

Kvankam la libertempa mezlernejo por kamparanoj en Dongshima estas modesta kompare kun normalaj mezlernejoj, tamen ĝi same povas efike havigi al la kamparanoj riĉajn sciojn kaj lingvajn kapablojn, tuj utiligeblajn en sia ĉiutaga vivo kaj laboro. Ĝi estas nova taŭga formo, kiu estas facile kaj malmultkoste realigebla, por fondi lernejojn en vilaĝoj kaj kulturaj intelektulojn kamparanajn.

Trad. Ŝtemu



Kuniklo: Ĉu vi sin distras per fiŝado?

Kato: Ho ne! Nun mi devas min vivteni per tio ĉi!

Pentris Luo Min-qiu

higienajn laborojn. Ekde tiam, multe ŝanĝiĝis la trajtoj de la vilaĝo; malmultiĝis malsanuloj kaj pliboniĝis la produkta laboro.

Por antaŭenpuŝi la kampanjon kontraŭ la kvar bestaĉoj, en la jarfino de 1957 kaj la komenco de 1958, higienaj laborkunvenoj kunvokiĝis unu post alia en diversaj lokoj, por interŝanĝi spertojn kaj elmeti novajn celojn. La antaŭe fiksita tempo de Guangdong-provinco por ekstermi la kvar bestaĉojn estis 8 jaroj, nun ĝi mallongiĝis ĝis 5; tiu de Jiangsu-provinco antaŭe estis 8 jaroj, nun mallongiĝis ĝis 4. La famaj historiaj urboj Jinan kaj Nankino decidis ekstermi la kvar bestaĉojn jam en tiu ĉi jaro. Ankaŭ aliaj provincoj kaj urboj ellaboris planon por ekstermi la kvar bestaĉojn. Espereble baldaŭ tute ŝanĝiĝos la higienaj trajtoj de nia lando.

Trad. I. U.

La vilaĝo Suno en Shanxi-provinco fariĝis unu el la higienaj modeloj

Foto de Zhang Rui-hua






ĈINAJ sportuloj alviciĝas al la plej bonaj sportuloj de la mondo. En 1957, ili establis tri novajn mondajn rekordojn en surbrusta naĝo, malpeza eklevo kaj virina altsalto. Ankaŭ en ĉiuj aliaj branĉoj de la sporto ili faris kaj faras grandan progreson.

PEZLEVO

Ĉe la fino de 1957, la landaj rekordoj por la tri-levaj peztutoj en kvar el la sep pezlevaj klasoj aŭ superis aŭ proksimiĝis al la rekordoj establitaj de olimpaj ĉampionoj aŭ konkurantoj en 1952 en Helsinki. Dudekdu-jara Chen Jing-kai establis novan mondan rekordon en 1957 levinte 135.5

Huang Qiang-hui kreis mondan rekordon

Foto de Sun Zhung-jing



kilogramojn. Malpezlevulo Huang Qiang-hui ĉe la tutlanda ĉampioneca pezleva konkurso, en 1958, per eklevo de 155 kilogramoj rompis la mondan rekordon de malpeza klaso de 154 kilogramoj. En la malpeza klaso, dudekunu-jara Zhao Qing-kui plialtigis sian rekordon de simpla eklevo de 152.5 kilogramoj en 1956, ĝis 167.5 kilogramoj en 1957. Li progresis en tia rapido kiu baldaŭ alproksimigos lin al la monda rekordo de 176 kilogramoj.

ĈAMPIONO DE SURBRUSTA NAĜADO

Qi Lie-yun, unuagrada naĝulo en Ĉinio, foriĝis monda ĉampiono por surbrusta naĝado de 100 metroj kiam li kovris tiun ĉi distancon en 1 minuto 11.6 sekundoj en konkurso en Kantono la 1-an de Majo, 1957. La surbrustan naĝadon de 200 metroj, Qi finis la unua en 2 minutoj 40.5 sekundoj, nur duonsekundon pli malrapida ol la oficiala mondrekordo. Mu Xiang-xiong, alia eminenta naĝisto, ankaŭ kovris tiun ĉi distancon en tempo nur iomete pli longa ol la monda rekordo.

PROMESAJ SALTULOJ

En novembro 1957, ĉina ĉampiona altsaltulino Zheng Feng-rong transsaltis 1.77 metrojn, rompinte la mondan rekordon de 1.76 metroj tenitan de Mildred McDaniel de Usono. Ŝi estas ankaŭ la unua aziano kiu establis mondan rekordon por kuroj kaj kampekzercoj en la pasintaj 21 jaroj. Aliaj elstaraj atletoj menciindaj estas Cai Yi-chu kaj Ma Xiang-long. Ma transsaltis 2 metrojn en altsalto, dum la rekordo de Cai en stangsalto en lasta jaro estis 4.32 metroj, kaj pli poste li transsaltis 4.34 metrojn ĉe la Printempa Landa Kunveno de Kura kaj Kampa Konkursado okazinta lastan februaron en Kantono.

POR MONDA HONORO

Per apliko de plibonigitaj teknikoj, ĉinaj sportuloj fariĝas fortaj rivaloj en internaciaj konkursoj. Ĉe la Tria Tutmonda Sportludoj de la Junularo okazinta en Moskvo en aŭgusto, 1957, la sep ĉinaj pezlevuloj kiuj partoprenis la ludojn gajnis honoron. Plejmalpezlevulo Chen Jing-kai akiris oran medalon, kaj malpezlevulo Huang Qiang-hui ricevis arĝentan. Ok el la naŭ ĉinaj naĝistoj kiuj partoprenis la konkurson gajnis poziciojn. La ĉina virina korbopilka teamo venkis la fortan polan kvinopon kaj gajnis la kvaran lokon en la konkurso. Kvankam la vira korbopilka teamo ne honorigis kiel la virina, tamen ilia rapida ludo impresis Moskvajn sportemulojn.

KORBOPILKAJ TEAMOJ

Ĉinaj korbopilka ludistoj gajnas reputacion pro sia rapida kaj preciza enkorbigado. Lastan jaron Ŝanhaja Studenta Korbopilka Teamo partoprenis la Parizan Universitatan Konkurson. Kvankam ĝi nur gajnis la kvinan lokon, ĝi surprizis parizajn rigardantojn per sia venko super la forta Brazila teamo je 73 kontraŭ 68.

Ankaŭ ĉinaj futbalistoj estas progresantaj. Notindaj ekzemploj de tio estas la konkursoj en februaro en Kantono inter ĉinaj teamoj kaj la Soveta Mondtasa Teamo. La Pekina teamo, organiziĝinta el la naciaj ĉampionoj de lasta jaro, post varmega konkurso en la 21-a de februaro, tenis la dek unu futbalistojn de la soveta teamo je egaliĝo je 1—1. La teamo "Aŭgust-unua" ankaŭ egaliĝis kun la soveta teamo je 1—1 en la sekvinta tago.

TABLA TENISO

En tabla teniso, ĉinaj teamoj bone sukcesis en la konkurso por la Mondaj Ĉampionecoj en Stokholmo. La virina teamo estis metita en la tria loko. Laŭ anonco de la Internacia Federacio de Tabla Teniso la 24-an de februaro tiun ĉi jaron, Wang Chuan-yao, ĉina landa ĉampiono, estis metita en la sepa loko inter la naŭ plej bonaj viraj ludistoj en la mondo por 1957-1958. Sun Mei-ying, antaŭa ĉampionino de Ĉinio, estis ankaŭ metita en la sepa inter la plej eminentaj ludistinoj en la mondo por la sama periodo.

Trad. Chen Hou-heng



Zheng Feng-rong supersaltis la mondan rekordan altecon

Foto de Li Dong-ao

MIRINDA TERAPIO POR ROMPITA OSTO

D-ro Liu Da-fu en Sekcio de Osta Ortopedio de Ĉin-medicina Hospitalo de Wuhan faris sukcesan eksperimenton kunkreskiĝi disrompitan oston per salikbranĉo. Tiun terapion D-ro Liu aŭdis de sia ĉin-medicina instruisto antaŭ 20 jaroj, sed li neniam ĝin provis. En lasta oktobro li faris eksperimenton per hundoj: Li detranĉis la rompitan parton de krurosto de la hundo kaj ĝin anstataŭis per egala freŝa salikbranĉo, kiun li traboris en la centro kaj surgutis freŝan sangon de virkoko sur ambaŭ ekstrecoj de la branĉo,


kiuj kuniĝis kun la ostopartoj. Poste li alkudris la haŭton, kovris ĝin per sangad-ĉesiga unĝento, bandaĝis la kruron kaj algluis al la hundo ostokunigan medikamenton. Post unu monato la hundo jam povis iom post iom paŝi. Duonjaron poste, la hospitalo detranĉis la resaniĝintan kruron por fari anatomian observon pri la efiko de tiu terapio kaj trovis, ke la branĉo jam kuniĝis kun la osto kaj oni eĉ ne povis rimarki la diferencojn inter ili. Nur per X-radia fotografado oni sukcesis tion rimarki. Nun oni decidis fari plujajn eksperimentojn kaj observojn por trovi sciencan klarigon pri la fenomeno.

KLIŜOJ KUN 712 LINIOJ EN UNU COLO

Por atingi la internacian teknikan nivelon, ekde marto la presejoj en Ŝanhajo, Pekino kaj Mukdeno en Nordoriento faris streĉajn klopodojn por fari kliŝojn kun plej densaj linioj. Antaŭe ĉinaj presejoj povis fari nur kliŝojn kun 200 linioj en unu colo. Sed en la konkurado ili superis unu la alian ĉiam renovigante la rekordojn. Tiel komenciĝante kun 200 linioj oni pli kaj pli altigis la densecon de linioj de 426, 450, 510 linioj kaj fine la Xinhua presejo en Mukdeno atingis 712 liniojn en unu colo de la kliŝo.

La Naciminoritatoj de Ĉinio

KIE LOĜAS LA ĈINAJ NACIMINORITATOJ?



Ĉinio estas unueca lando kun multaj nacioj. Krom la plejmultembra han-nacio, vivas en ĝi pli ol 50 naciminoritatoj kun pli ol 35 milionoj da popoloj kiuj konsistigas ses procentojn de la tuta ĉina loĝantaro. La naciminoritatoj kun unu aŭ pli ol unu miliono da anoj estas la nacioj mongola, huj(hui)*-a, tibeta, ujgura, mjaŭ(miao)-a, ji-a, ĝuang(zhuang)-a, buji-a, korea kaj manĉua. La naciminoritatoj kun 200,000 ĝis 1,000,000 popoloj estas la nacioj kazaha, dung(tung)-a, baj-a, taja, kava-a, hani-a, jaŭ(yao)-a, li-a, lisu-a, ŝe-a kaj tuĝja-a. Tiuj kun malpli ol 200,000 anoj estas dungŝjang-a, ĥalhaza, tu-a, naŝi-a, lahu-a, ŝuj-a, ĝingpo-a, ĉjang-a, gaŭŝan-a, sala-a, rusa, sibo-a, uzbeka, taĝika, tartara, baŭ'an-a, jugur-a, olunĉun-a, dahur-a, molaŭ(molao)-a, nu-a, dulung-a, golaŭ-

(gelaŭ)-a, ovenke-a, maŭnan(maonan)-a, aĉang-a, bulang-a, heĝe-a, benglung-a k. a. nacioj. La plej multnombra el la naciminoritatoj estas ĝuang-nacio kun pli ol 6,943,000 anoj, kaj la plej malgrandaj estas la nacioj olunĉun-a, dulung-a, heĝe-a, benglung-a kun po malpli ol kvin mil anoj.

KIE LOĜAS LA NACIMINORITATOJ?

La naciminoritatoj loĝas plejparte en la limregionoj. La mongoloj, ekzemple, loĝas en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en la norda limregiono de Ĉinio. Kaj en tiu regiono kaj aliaj partoj de nordorienta Ĉinio loĝas ankaŭ koreanoj, manĉuoj, dahur-oj, olunĉun-oj, ovenke-oj, heĝe-oj. En nordokcidenta Ĉinio loĝas ujguroj, huj-oj,

tibetanoj, kazahoj ĥalĥazoj, taĝikoj, sibo-oj, uzbekoj, rusoj, tartaroj, dungŝjang-oj, tu-oj, sala-oj, jugur-oj kaj baŭ'an-oj. En sudokcidenta Ĉinio loĝas multaj naciminoritatoj, inter kiuj la plej multmembraj estas la tibeta, mjaŭ-a, ji-a, buji-a, dung-a, baj-a, taja, kava-a, hani-a, lisu-a, naŝi-a, ŝuj-a kaj ĝingpo-a. La tibetanoj grandparte loĝas en Tibeto. En mez-suda Ĉinio loĝas la ĝŭang-a, jaŭ-a, li-a kaj tuĝia-a. En orienta Ĉinio loĝas la ŝe-oj kaj en la liberigota Taiwan gaŭŝan-oj.



Diversnaciaj studentinoj en la Centra Instituto de Naciminoritatoj

Post la liberiĝo, en 90 procentoj de la regionoj, kie dense loĝas naciminoritatoj jam efektiviĝis regiona aŭ distrikta aŭtonomio.

LA SOCIAJ STATOJ DE LA NACIMINORITATOJ

En la komenco post la liberiĝo, 30.000.000 el la naciminoritatoj vivis en sociekonomia stato simila al tiu de han-nacio, kaj ili estis ĉefe ĉŭang-oj, uĝuroj, huj-oj, koreanoj, mjaŭ-oj, baj-oj, buji-oj k.a.; ĉirkaŭ miliono, ĉefe ji-oj en Liang-montaro en Sichuan-provinco, vivis en stato de sklava socio; 700.000, ĉefe kava-oj, lisu-oj, nu-oj, dulung-oj, ĝingpo-oj en Yunnan-provinco, kaj olunĉun-oj vivis certgrade ankoraŭ en primitiveco. Post la liberiĝo,

socialisma reformo en posedo de produktaj rimedoj jam efektiviĝis en regionoj loĝataj de 30 milionoj da naciminoritatoj, kaj demokrata reformo en politiko jam efektiviĝis aŭ estas efektivigata en regionoj kun 3 milionoj da naciminoritatoj; nur en regionoj kun 2 milionoj da naciminoritatoj loĝantoj, kie ankoraŭ ne maturiĝis la necesaj kondiĉoj, demokrata reformo ankoraŭ ne efektiviĝis.

** En la parentezoj estas donitaj la formoj, kiujn oni trovas en la antaŭa numero de nia gazeto.*

(Daŭrigo de p. 92)

maksimo, moto kaj aliaj vortoj, per kiuj la artisto esprimas sian personecon, travivaĵon, aspiron, sintenon ktp.

La ideografiaĵoj en sigelo estas laŭ tradicio ĉefe en *zhuanwen* (skribmaniero uzata ĝis Handinastio), sekve la sigelartistoj devas koni kaj posedi la kapablon skribi bele kaj korekte en *zhuanwen*. Kiam li faras sigelnegativon sur ŝtono per speciala gravurilo, li ne redonas ŝablone senivan imitajon de penikskribado, sed produktas artaĵon kun aparta belo kaj gusto estigita per tranĉado.

Generacio post generacio formiĝis pluraj skoloj de sigelilartistoj en Ĉinio. Troviĝas specialaj biografiaj libroj pri ili kaj multaj sigelalbumoj de famaj sigelilo-gravuristoj.

Ke la tri belartoj en Ĉinio: pentrarto, belskriba arto kaj sigelarto devenas de la sama fonto kaj

havas tre intiman rilaton inter si, pruvas ankaŭ tio, ke sigelartistoj ofte estas samtempe pentristoj aŭ belskribistoj. La sigelarto revekis interesiĝon lastatempe post multjara stagno. En Pekino kaj Ŝanhajo stariĝis organizaj komitatoj por ke la sigelarto-amantoj kune praktiku kaj studu la arton.

Sur ŝtona sigelilo, la artisto povas bele esprimi la arton de antikva ĉina ideografio per tranĉilo anstataŭ skribilo. Dum gravurado sur ŝtonon, povas estiĝi neregulaj tranĉilsignoj, naturaj kaj interesaj. Kvankam manipuli la tranĉilon similas al manipuli la skribilon, tamen la gustoj estas malsamaj. Por perfektigi la arton de gravurado sur ŝtono nur 1-2 kvadratcola, la artisto tre atentis pri ideografiskribado, komponado, tranĉilmanipulado, entranĉa aŭ reliefa gravurado, la ornama rando, kaj plue pri surflanka surgravurado de sia nomo, alskribo, bildoj de pejzaĝo, floroj, birdoj, versoj ktp.

Trad. L. T.



Hu Pei-heng :

Sigelilfarado kiel Arto

SIGELILFARADO estas tradicia arto de Ĉinio kun tre longa historio. Estas pruvite, ke sigelilo jam ekzistis antaŭ 343 a. K. en Zhou-dinastio. En la dinastioj Qin kaj Han jam tre populariĝis la uzado de sigeliloj, kiel aŭtentikigiloj ĉu de ŝtataj oficuloj ĉu de privatuloj, kaj ĝis hodiaŭ, laŭ la tradicia kutimo de la ĉina popolo, preskaŭ ĉiu ĉino havas sigelilon.

La ĉina ideografiaĵo por sigelilo 印, formiĝas el du partoj: la maldekstra parto 卩 simbolas ungon aŭ manon, dum la dekstra 卩 simbolas bambuan atestilon; do tiu ideografiaĵo signifas: bambuatestilo en mano. En la antikveco, la eksterlanden senditaj delegitoj kunportis bambuatestilon, faritan el bambupeco kun brulstampitaj vortoj por identigi la personecon de la delegitoj. Kaj tiu bambuatestilo poste evoluiĝis en sigelilon. Tial en la antikveco, la sigeliloj funkciis kiel la nunaj atestaj dokumentoj. Sed nun, oni povas havigi al si alian atestilon, se oni perdis la originalan, dum en la antikveco, perdinte la ofic-sigelilon, oni perdis samtempe ankaŭ la oficon. Tial en antikveco okazis multaj epizodoj koncerne perdiĝon de ofic-sigelilo. Nun la sigelilo jam ne estas tiel grava kiel en la antikveco, tamen ĝi ankoraŭ funkcias kiel atestilo por ni ĉinoj, kiel la subskribo por la eŭropanoj.

La sigeliloj estas faritaj el tre diversaj materialoj: oro, arĝento, kupro, eburo, jado, bamburadiko, agato, malmolaj lignoj, korno, diversaj gravurtaŭgaj ŝtonoj k.a. Antaŭ Yuan-dinastio (1205), kupro kaj jado estis la ĉefaj materialoj por fari sigelilojn, sed nun la sigelartistoj uzas ĉefe subtilecajn kaj molecajn ŝtonojn. La kupraj kaj jadaĵaj sigeliloj estas pli fortikaj kaj ne facile rompeblaj, sed sur ili la gravurstilo ne povas multe varii laŭ gusto. Tiuj el kupro pli taŭgas por oficialaj sigeloj. Ili estis plejparte ne gravuritaj sed forĝitaj.

En la dinastioj Yuan kaj Song tre prosperis la pentrarto, kaj iuj elstaraj pentristoj kaj belskribistoj gravuris ŝtonajn sigelilojn, sur kiuj la artistoj povis libere gravuri laŭ sia gusto kaj esprimi sian artisman spiriton de maturforteco, senartifikeco, antikva simpleco kaj originaleco. De tiam ŝtono fariĝis la ĉefa materialo de sigeliloj anstataŭ kupro. Sed ne ĉia ŝtono taŭgas por sigelilo. Oni elektas

ŝtonojn senĝrajnajn, okulplaĉajn en koloro kaj kun moleco konvena por gravurado. Multspecaj estas tiuj produktitaj en Qingtian-gubernio kaj Changhua-gubernio de Zhejiang-provinco, kaj ĉe Shou-monto en Fuzhou de Fujian-provinco. La ŝtonoj produktitaj en Qingtian-gubernio estas subtila en strukturo kaj modera en malmoleco, el kiuj iuj estas plene diafanaj kaj bele brilas sub lumo, aliaj estas blankaj kiel fiŝcerbo, iuj aspektas kvazaŭ okulplaĉa vakso, aliaj enhavas naturajn desegnaĵojn similajn al folioj de artemizio. La ŝtonoj produktitaj ĉe Shou-monto havas belajn kolorojn, inter kiuj iuj estas milde blankaj, pli belaj ol jado, iuj estas ruĝaj, bluj aŭ mikskoloraj. La ŝtonoj el Changhua estas plejparte plurkoloraj aŭ ruĝaj. Iuj ŝtonpecoj de Changhua ruĝas pli brile ol freŝa kok-sango. Do mem la ŝtono por sigelilo jam estas natura artaĵo. Des pli ili ĉarmas post kiam ili estas poluritaj, kaj estas skulptita sur la supro figuro de leono, drako, tigo, birdoj aŭ floroj ktp.

La manieroj de sigelado estas malsamaj antaŭ kaj post la ekuzado de la papero. Antaŭ tio ĉinoj skribis dokumentojn sur bambuaj pecoj, kiujn oni ligis per ŝnuro, ĉe kies nodo estis almetita argila buleto por ĝin fermi. La sigelon oni metis sur tiun argilbuleton, kiel nun sur la sigelvakson. Post kiam la papero anstataŭigis la bambuajn pecojn, oni enkondukis unue "akvostampadon", t.e. oni stampis sigelon sur la paperon ŝmirinte la sigelilon per inko el cinabro, gluo kaj mielo. Poste oni evoluigis la preparadon de inko, ĝin farante el cinabro miksitaj kun artemiziaj fibroj kaj oleo. La tiel farita inko estas nomata "sigel-pasto". Per tiu oleinko oni metas sigelon brile ruĝan sur papero blanka, kaj nomas tiun metodon "olestampado".

La arto de sigelfarado havas intiman rilaton kun pentrarto. Al belaj pentraĵoj ne povas manki bel-surskribo kaj unu aŭ du artisme belaj sigeloj en konvena loko. Tio fariĝis jam nedisigebla parto de pentraĵoj laŭ ĉina tradicia stilo.

La enhavo de sigelo estas tre varia. Ĝi povas esti ofictitolo, persona kaj familia nomoj, bondeziraj vortoj, eĉ bildoj, kaj en pli postaj generacioj, ankaŭ dom- aŭ ĉambro-nomo, aforismo,

(Daŭrigo sur p. 91)

SONĜO

— El "Rakontoj de Xue Tao" —

IU xiucal* malobservis regulon de la imperia lernejo kaj estis arestita laŭ la ordono de la eduka inspektoro, kiu sidis en la halo kun granda kolero, intencante severe puni la pekinton.

La xiucal bone sciis, ke la inspektoro estas ĉiam tre severa, kaj estos vane peti lian pardonon; li do elpensis rimedon por lin moki. Respektplene li ekgenuis antaŭ la oficisto, dirante nur jenon: "Mi jam intencis mem veni por submeti min al via inspektora moŝto, sed iom malfruiĝas, ĉar mi ĵus akiris mil uncojn da arĝento kaj devis okupiĝi pri ĝia dispono."

Kiam la inspektoro aŭdis, ke la xiucal akiris grandan sumon, ekfulmis ideo en lia kapo kaj tuj forvaporigis duono de lia kolerego. "De kie vi akiris la monon?" li ekscivolis.

"Elfosita el la tero," estis la respondo.

"Kiel, do, vi intencas disponi pri tiu granda hazarde akirita mono?"

"Konsultinte kun mia edzino, mi intencas elspezi duonon de la sumo por aĉeti kampojn, ducent uncojn por aĉeti teron kaj konstruigi domon, cent por aĉeti diversajn ilojn, cent por aĉeti sklavon kaj sklavinon, ĉar ni havas nun nenion tian . . ." respondis la xiucal.

Pensante, ke eble la xiucal ne forgesus entute sian inspektoron, la oficisto lin interrompis per demando. "Kaj kiel pri la ceteraj cent uncoj?"

"Duono de ili uziĝos por aĉeti librojn por intensiva studado."

"Kaj la aliaj kvindek uncoj?" la oficisto demandis kun granda ekscito.

"Ilin mi donacos al via inspektora moŝto por esprimi mian sinceran dankemon al vi pro via instruado farita ĝis nun."

"Tion," kontente diris la inspektoro, "mi ja ne meritas."

Kaj la inspektoro ordonis, ke vino kaj manĝaĵoj estu preparitaj en la hejmo por regali la xiucal-on. Dum la trinkado, la inspektoro kaj la lernanto ĝojplene interbabiladis. Tamen la oficisto ne povis tute flanken ŝovi la pensadon pri la 50 uncoj da arĝento, kaj demandis la xiucal-on: "Vi

venis ĉi tien en urĝeco, ĉu vi jam bone kaŝis la arĝenton?"

Ekstaris respektplene la xiucal kaj diris: "Kiam mi ĵus estis dividinta la monon, subite min vekis mia edzino. Mi serĉis la monon, sed ĝi jam malaperis, do ankaŭ ne necesis plu ĝin kaŝi."

"Do, vi babilis nur pri sonĝo?" urĝeme demandis la inspektoro.

"Ja nur pri sonĝo mi parolis," la xiucal respondis malrapideme.

La eduka inspektoro fariĝis treege malespera kaj ankaŭ kolera, sed jam ne estis eble tuj ŝanĝi la sintenon. Li povis nur diri malgraŭvole: "Dankon, dankon, ke vi memoris pri mi eĉ en sonĝo!"

Trad. Censinio

* *Xiucal*, honora titolo por instruitulo trapasinta certagradan ekzamenon en malnova Ĉinio antaŭ 1911 p. K.

Ilustris Du Zhu



VINTRE de 1955, en Wudi-templo ĉe la orienta fino de Zhangjiafen-vilaĝo, instaligis forĝista forno. De tiam la martela tintado altiradis en la templon, multajn maljunulojn kun la manoj ŝovitaj en la manikojn, kaj la kapo retirita en la kolumnon de ŝafpelta robo por pasigi la severan vintron.

Kvankam Wudi-templo estas malgranda kaj havas nur unu ĉambron, tamen ĝi tre taŭgas por forĝejo. Brile ruĝis la fajro en la forĝeja forno, ĉirkaŭ kiu staris la novan spektaklon rigardantaj maljunuloj. Post momento, iu aĝulo elpinĉis per prenilo el la forno inkandeskan ferplaton. Ĝin li marteladis, reenformigis, form-korektis kelkfoje per la martelo, kaj jen formiĝis el ĝi sarkila klingo.

Estas ja ne mirige, ke kolektiĝas amaso da homoj en la kamparo por rigardi forĝadon. Sed estas speciala kaŭzo ĉi tie en la nomita vilaĝo, ke la loĝantoj tiel multe interesiĝis pri la nova forĝejo.

Ye Jian - yuu :

Post la

En la vilaĝoj de tiu ĉi distrikto, jam de multaj jaroj troviĝas ja neniu forĝejo, kaj por hardi aŭ ŝtaligi la klingon de malnovaj terkulturiloj, oni devis iri al iu urbeto. Por tio oni ne nur devis iri longan vojon, sed ankaŭ devis atendi dek ĝis dekkvin tagojn. Estis tre maloportune, sed nenion alian oni povis fari.

Antaŭ nelonge, en la vilaĝon alvenis maljunulo 64-5-jara sed sufiĉe vigla, kiu petis laboron ĉe la vilaĝaj kadroj tuj post la alveno. Li estas emeritiĝinta laboristo de la Changxindian-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko. De sia 16-jara aĝo li jam komencis labori tie, kaj nun post 50 jaroj da

Translokigo de Montoj

LA montoj Taihang kaj Wangwu estis sepcent liojn ĉirkaŭe kaj altis cent mil futojn. Norde de tiuj montoj loĝis Malsaĝa Avo, kiu aĝis jam preskaŭ 90 jarojn. Lia domo vizaĝis kontraŭ la montoj kaj li trovis tion tre ĝena, ke la montoj baras al li la vojon kaj li devas ĉirkaŭiri ĉe el- kaj re-irado.

Li do kunvokis la tutan familion kaj konsiliĝis:

“Ni kune tutforte ebenigu la montojn kaj


faru rektan vojon al la bordo de Han-rivero. Ĉu bone?”

Ĉiuj aprobis la ideon ĥore. Nur lia edzino dubis pri la afero, dirante:

“Via forto ne sufiĉas eĉ por malaltigi monteton; kion vi povus fari kontraŭ tiuj du grandegaj montoj? Cetere, kien vi metos la gigantan amason da tero kaj ŝtonoj?”

“La teron kaj ŝtonojn ni jetu en la maron,” respondis la aliaj.

Ilustris Xu Bei-hong



Emeritiĝo

diligenta laboro, ĉu estus dece asigni al li ankoraŭ laboron?

Sed li diris, ke li estas veterana forĝisto oklaŝa kaj havas riĉajn spertojn super la forno kaj en la uzado de la preniloj kaj marteloj; se nun oni ne plenuiligus lian lertecon, ĉu li kunportu ilin kun si en la ĉerkon?

Kaj oni klarigis al li, ke nenio estas farebla, ĉar en la vilaĝo ne troviĝas fabriko.

Kion la maljunulo pensas, tion li eldiras, kaj kion li diras, li nepre faras. Tiujare leviĝis la tajdo de kooperiĝo, kaj en la vintro, pli ol naŭcent



Zhang Shun en la forĝejo

La sekvantan tagon, Malsaĝa Avo jam ekiris kun siaj filoj kaj nepoj al la laboro. Ili fosis ŝtonojn kaj teron kaj vektoportis ilin en korboj al la maro. La fileto de najbara vidvino, kiu havis aĝon de dentŝanĝo, ankaŭ kuris al ili por helpi.

Sezonoj alternis, antaŭ ol ili unufoje iris kaj revenis.

Iu Maljunulo Saĝa loĝanta ĉe la Riverkurbo, ridis je ilia penado kaj provis ilin ĉesigi, dirante:

“Kiom malsaĝaj vi estas! Per viaj lastaj tagoj de la vivo kaj kadukaj fortoj, vi ne povos forigi eĉ hareton de la montoj. Kion vi povus fari al tiom da tero kaj ŝtonoj?”

Eligante longan suspiron Malsaĝa Avo respondis:

“Kiel ne kuraceble stulta vi estas! Vi eĉ ne havas la prudenton de la infano de la vidvino. Kvankam mi mortos, tamen miaj filoj postvivos min kaj ili generos nepojn, kiuj havos ankaŭ siajn filojn. Kaj la filoj generos denove filojn kaj nepojn. Tiel, filoj filojn; nepoj nepojn. Generacion sekvas generacio senfine. Dume la montoj tute ne kreskas. Kio do malhelpos nin, ilin ebenigi?”

Maljunulo Saĝa trovis nenion por respondi.

Trad. Honfan

familioj en ok vilaĝoj organiziĝis en agrikultura produkta kooperativo, nomata Ruĝa Majo. La maljunulo promenadis en la kampoj, kiam la vilaĝoj sin okupis pri la kooperiĝo. Li rimarkis, ke iu kooperativano ŝvitege fosas teron sur riverbordo, kaj la pioĉo povas enpusiĝi en la teron, ĉiufoje nur kelkajn colojn. Li paŝis al li kaj diris:

“Nu, frateto, iom ripozu!” Li deprenis la pioĉon kaj ĝin pririgardis laŭ la maniero de metia majstro.

“Aj! ĝi ja estas pli malakra ol la dentoj de maljunulino. Se vi ne estus tiel juna. . . .”

“Jes, la ŝtalo jam forfrotiĝis, tamen ni devas kontenti pri ĝi nehavante pli bonan.” Tion dirinte la junulo daŭrigis sian energian fosadon.

Vespere li vizitis la sekretarion de la kompartia filio kaj diris, ke li intencas fondi forĝejon por ripari kaj fari agrikulturilojn. Kaj krome li aldonis siajn argumentojn.

Tio metis la sekretarion en embarason: ne decus lin rifuzi, ĉar lia propono estas el sincera helpemo; kaj post pli granda ĝojo de la kooperativo, tia forĝejo estas ja vere necesa; kaj ankaŭ ne decus akcepti lian proponon, ĉar li ja hejmenvenis por ĝui emeritan vivon, neniel decas ŝarĝi lin per peniga laboro en lia vivkrepusko. Post longa pripensado, fine la sekretario klopodis elturniĝi per preteksto:

“Estante tiom aĝa vi ankoraŭ deziras laŭeble helpi la kooperativon, kompreneble la kooperativa-

noj danke bonvenigas vian proponon. Tamen la kooperativo ja ĵus fondiĝis, kaj ĝi ankoraŭ ne havas sufiĉan kapitalon por. . . .”

Ne lasante la sekretarion fini sian frazon la maljunulo ekdiris:

“Emeritan pension mi ja ricevas de la ŝtato, mi laboros por la kooperativo tute senpage. . . .”

“Mi ne diris pri tio,” interrompis lin la sekretario, “mi volis diri, ke oni bezonas kapitalon por fondi tiam forĝejon, kaj ĝuste la kapitalo mankas al ni.”

“Ja ne necesas granda kapitalo. Mi ĵus ricevis la pension, ĝin mi pretas pruntedoni al la kooperativo.”

La sekretario de la partia filio volis ankoraŭ ion diri, sed trovis nenion konvenan.

La maljunulo nomiĝas Zhang Shun, kiu, dum la Granda Striko de la Sepa de Februaro*, aktivis kiel grupestro de strikgardistoj. Li ne estas komunisto, sed ĉiam fidus al la Komunista Partio. En la pasinteco tute ne ekzistis emerita sistemo, kaj la laboristoj por vivteni devis laboradi ĝis kiam ili ne plu povis, kaj tiam mortis de malsato.

Ankaŭ mi provu

Foto de Li Yi-fang



Li tre kortuŝiĝis pro sia emeritiĝo. “La partio bone prizorgas nin maljunulojn, kial do ni ne prizorgu la aferojn de la partio! Kvankam mi estas maljuna, tamen ne stultiĝis mia kapo. La kooperativo ja fondiĝis laŭ la alvoko kaj sub la gvidado de la partio. Kaj ĝi ege bezonas nun forĝejon!”

Ĉar neŝanceligeblan volon li havis, tial nenia malfacilo povis lin haltigi. Blovilon li prunteprenis de la najbaro, kiu iam faris fabkazeon; amboson li trovis ĉe amiko kiu iam estis ŝuisto; li sukcesis ankaŭ pruntepreni martelejon; kaj faris fornon utiligante kelkajn ladpecojn de difektitaj petrolojoj kaj aĉetis kelkcent ĝinojn da karbo per ok jŭanoj el sia propra poŝo. En ĉirkaŭ 5 tagoj la forĝejo jam fondiĝis kun nenia monhelpo de la kooperativo.

Kiel li poste diris, li havis tri celojn por fondi la forĝejon: 1) ripari laborilojn por la kooperativanoj kaj tiel faciligi ilian laboron; 2) instrui sian metion al junuloj en la kamparo; 3) konservi sian laboremon akiritan dum la tuta vivo.

Nun liaj tri celoj jam efektiviĝis. En la pasinta jaro, la malgranda forĝejo produktis kvar mil pecojn da terkulturiloj de 50 specoj kaj kreis valoron de ĉirkaŭ 2,000 jŭanoj. Li ankaŭ kreis specialan bruttiratan instrumenton por elfosi bataton

En la aŭtuno de la antaŭlasta jaro, kiam frosto estis tuj komenciĝonta, la batato en pli ol ducent muoj de la kooperativo ankoraŭ ne estis rikoltita. Elfosi bataton estas laboro peza kaj malrapida, eĉ forta laboranto povas rikolti ĉiutage nur ok-naŭ dekonojn da muo da batato. Laŭ la disponeblaj laborfortoj, la kooperativo bezonis dudek tagojn por finrikolti la bataton. Damaĝo minacis la rikoltaĵon. Tiam Zhang Shun silente sin enfermis en la domo, laboregis du tutajn noktojn sub olelampo kaj fine elfaris batato-rikoltilon, per kiu 3-4 duon-laborfortoj** povas rikolti 15 muojn da batato ĉiutage kun unu bruto.

Ĉar ĝi estas farita el reformita malnova plugilo, tial ĝi ne multe kostis. Tiujare, la kooperativo Ruĝa Majo sukcesis rikolti sian bataton en malpli

* Temas pri la sanga subpremo de la militaristoj al la batalo de fervojistoj de Pekin-Hankou-a Linio por libereco de organizado de sindikatoj en 7-a de feb. 1923. La batalo poste disvolviĝis en granda landskala striko.

** Homoj posedantaj laborforton, proksimume egalantan duonon de ordinara viro.

ol 5 tagoj, kaj suferis neniom da damaĝo de la frosto.

En la pasintaj du jaroj, li ankaŭ instruis du metilernantojn. Unu el ili, Zhao Zhen-xiang, estas orfo ekde infanaĝo kaj alia, Wang Lu, estas junulo petola kaj kverelema. Tiuj ĉi du junuloj ne nur ellernis kiel manipuli prenilon, observi ardon de fajro, fari desegnon kaj koni la kvalitojn de diversspecoj de fero kaj ŝtalo jam antaŭ pli ol jaro, sed ankaŭ liajn noblajn virtojn de laboremo, de sincera amo kaj aktiva servado al la kooperativo.

Nun, la kooperativo Ruĝa Majo estas konstruanta akvokonservejon ĉe Mangniu-rivero. Depost la konstruado, ilia forno funkcias tage kaj nokte. Kiam ripozis la kooperativanoj nokte, ili sin okupas pri kontrolado kaj riparado de laboriloj. La kadroj de la kooperativo lin admonis, ke li ripozu sufiĉe kaj ne trolacigu sin. Sed li respondis: "Baldaŭ Komenciĝos la printempa plugado, kaj antaŭ la degelo, nia forĝejo devas finpretigi ĉiujn bezonotajn terkulturilojn."

Elĉinigis Li Shi-jun

Miaj Personaj Impresoj

—Rosyne Moreno, jurnalistino de "Laborista Vivo", organo de la Franca Sindikata Federacio—

MI alvenis en Pekinon nur malpli ol unu monaton, sed dank' al la afabla helpo de ĉinaj kamaradoj, mi multon vidis kaj kontaktis kun multaj personoj. Miaj impresoj estas tiel multaj, ke mi ne povas ordigi ilin por la nuna momento. Mi devas diri, ke Ĉinio estis tute fremda al mi ĝis antaŭnelonge, tamen de unu monato mi jam vidis per miaj propraj okuloj, la veran staton de socialisma Ĉinio.

Kio plej profunde min impresis estas la entuziasmo de la ĉina popolo. Mi faris vizitojn al entreprenoj metalurgiaj, minaj, ŝtalforĝaj, ĉemiaj kaj ŝpin-teksaj en Mukdeno, Fushun, Anshan, Changchun kaj Pekinaj antaŭurboj. La diverslokaj laboristoj komparas la "hodiaŭon" kun la "antaŭliberiĝo". Oni povas facile kompreni, kiom grandan sukceson akiris la ĉina popolo, nur kiam oni aŭskultas la parolojn mem de la laboristoj.

Mi estis mirigata verdire, vidante en iu agrikultura kooperativo ĉe Pekina antaŭurbo, junajn intelektulojn, partoprenantajn en ĝia laboro. Tamen, tio pli bone komprenigis al mi la ĝustan politikon de la Popola Registaro por kunligi la popolanojn de diversaj socitavoloj en solidan aliancon. Samtempe, la laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj povas pli

bone kompreni unu la aliajn en komunaj vivado kaj laborado.

Mi miris ankaŭ pri tio, ke la laboristoj de la fabrikoj povas elmeti proponojn kaj kritikojn. Tio montras ilian rolon, kiun ili ludas en sia fabriko. Ili rigardas la fabrikon kiel sian "propran hejmon". Ankaŭ tio estas la fonto de kunligado, flanke de la registaro kun la fundamenta amaso.

Ĉinaj kamaradoj havas plenan konfidon al la fremdaj vizitantoj. Ili diris: "Volu montri al ni la mankojn en niaj laboroj, ni deziras ilin plibonigi." Tio, laŭ mi, estas ja grandanima modesteco. La konfido al la fremdaj vizitantoj ankaŭ pravas, ke la amikeco kaj solidareco inter la ĉina kaj tutmondaj popoloj jam disvolviĝis.

"Heping! (paco)" estas la unua ĉina vorto, kiun mi lernis. La vorton "heping" al mi instruis iu virino en Fushun, kiu unue min demandis: "Kiel la vorto "paco" estas parolata en franca lingvo?"

Paco! Ĝi estas ege necesa por la ĉina popolo, kiu volas ĉiam plu antaŭen marŝadi.

Tio estas nur miaj impresoj ne kompletaj. Kaj fine, se mi devus eldiri la karakterizaĵojn de la ĉina popolo, ili estas: "bravo, laboremo, amikeco kaj pacamo."

Mallongige tradukis Liao Zhigen



S-ro H. Ragab vektportas teron

Foto de Niu Wei-yu

LA 24-an de marto, sur la konstruejo de Dektrimaŭzolea Akvokonservejo, aperis volonta laborbrigado, konsistanta el pli ol 40 arabaj amikoj. Kune kun la konstruantoj tieaj, ili aŭ ŝovelis, aŭ portis teron, kaj per ŝvitgutoj de laboro, kreskigas la florojn de amikeco inter ĉina kaj araba popoloj.

Kiuj ili estas? La konstrueja disaŭdiga stacio emocie informis tra la mikrofono la jenon: "S-ro H. Ragab, la Ambasadoro de Unuigita Araba Respubliko ĉe Ĉinio, la tuta oficistaro de la ambasadorejo kaj arabaj profesoroj kaj studentoj en Pekino venas por helpi nin en la konstruado de la akvokonservejo. Ni esprimu nian koran dankon al niaj amikoj el la malproksima lando, per pli granda laborfervo kaj laborrezulto!"

Antaŭiras la Ambasadoro

Alveninte al la konstruejo, la arabaj amikoj tuj komencis streĉan laboron. Antaŭiras Ambasadoro Ragab, jen ŝovelante jen vektportante la teron. Li laboras senĉese kun plena vigleco kaj granda energio en la tuta korpo. Li diris, ke li neniam forgesas la amikan subtenon de la 600-miliona ĉina popolo per ilia tuta forto, kiam Egiptio

Yu Min-seng:

Ŝvito por

estis invadata. Ekde tiu tempo li esperis havi okazon por esprimi la amikan senton de la egipta popolo al la ĉina. Nun la okazo fine venis. Antaŭ kelkaj tagoj, li vizitis la konstruejon kun alilandaj ambasadoroj kaj la giganta konstrulaboro profunde lin impresis. Kiam li reiris, li kunvenigis la personaron de la ambasadorejo, kaj arabajn profesorojn kaj studentojn en Pekino. En la kunveno, ĉiu sin anoncis por labori volonte ĉe la konstruejo.

Malgraŭ Malvarmo, Laco kaj Malsato

"Kompreneble," diris Ambasadoro Ragab, "por tia granda konstruaĵo, kelkaj korboj da tero, kiujn ni portas, neniom signifas; sed tio ja estas sincera esprimo de amika sento, kiun la araba popolo havas por la ĉina, kaj ankaŭ simbolo de la amikeco inter niaj du landoj!"

Ĉiu araba amiko sindoneme laboras. Ilin instigas la amikeco inter Ĉinio kaj Arabio. Ili reciproke kuraĝigas: "Pli da energio! por ke la konservejo, bonon dononta al ĉina popolo, estu pli frue finkonstruita! Pro nia amikeco, portu pli da tero!"

Posttagmeze, la vetero fariĝis multe pli malvarma. La mastro de la konstruejo proponis ripozon al la gastoj. "Ne," diris la gastoj, "malvarma estas la vetero, sed la laboro nin varmigas!" Tiel ili des pli energie laboris. Du arabaj profesoroj havis ĝuste religian fasttagon laŭ islamo, kaj ne povis manĝi en tiu tago, sed ili ankaŭ senĉese portadis teron, kun granda entuziasmo. Ili diris: "La amikeco instigas nin, ĝi forgesigas al ni la malsaton, nin okupas nur la penso, ke ni plimulte helpu al ĉina popolo, kaj portu plimulte da tero!"

Dankon al Amikoj per Pli Energia Laboro

La novaĵo pri la helpo de arabaj amikoj disfamiĝis tra la tuta konstruejo. Ilia laborfervo multe stimulis la milojn da konstruantoj tieaj. Kaj hodiaŭ ĉies batalvolo pli fortiĝis, laboremo pli ardiĝis. La konstruantoj decidis danki la arabajn amikojn pro ilia helpo per pli granda rezulto de sia laboro. Amaso da dankleteroj legiĝis ĉe la mikrofono de la disaŭdiga stacio. La volontaj laborregimentoj de la Instituto de Aerveturado kaj de la Popola Liberiga Armeo eĉ sendis siajn reprezentantojn por persone danki la arabajn amikojn. Ili, krome, kantis plurajn kantojn por la gastoj.

Amikeco

Plena Kredo al Ĉinio pri Ĝia Plirapida Atingo de la Nivelo de Britio

En la tuta konstruejo de la akvokonservejo bolis la laborfervoro, kaj de la arabaj amikoj kaj de la tieaj konstruantoj. Ambasadoro Ragab diris ekscitite: "Grandioze! Viroj kaj virinoj, aĝuloj kaj junuloj, intelektuloj kaj laboristoj kaj kamparanoj, ĉiuj unuanime, sindoneme, tutforte laboradas por sia granda patrio. Tia popolo kia la ĉina, kiu disvolvas tiel grandan laboremon, povos sendube pli

rapide, ol kiel planite, atingi la nivelon de Britio en la ĉefaj produktaĵoj.

Parolante pri la impresoj akirita dum la laborado, la ambasadoro aldonis: "Estas rakontite tre multe pri la helpado al la landoj postrestintaj fare de la progresintaj. Tio ja estas necesa sendube. Sed vidinte, kio okazis ĉitie, ni venis al konvinkigo, ke la plej fundamenta rimedo por la lando, kiu volas forskui la postrestecon kaj malriĉecon, por atingi progresintecon kaj riĉecon, estas ĉefe la propra klopodado de la popolo."

La arabaj amikoj laboris ses horojn sur la konstruejo de Dektri-maŭzolea Akvokonservejo, je la tria horo posttagmeze ili reiris en Pekinon kun senlima dankemo de la tuta konstruantaro kaj sia ĝojo de laboro.

Esperantigis Zensto



KURANTAJ AFEROJ

AMIKA DELEGITARO DE BIRMAJ STUDENTOJ BONVENIGITA

La Amika Delegitaro de Birmaaj Studentoj estrita de S-ro U Hla Shwe atingis Kunming, la ĉefurbo de Yunnan-provinco, je la 14-a en lasta aprilo. Pli ol 1,200 studentoj kaj junuloj en Kunming ĉeestis la bonvenigan kunvenon je la 8-a vespere de la sama tago. La delegitaro donacis al la junuloj de Yunnan-provinco silkan flagon kaj arĝentan spadon, kiu reprezentas antikvan civilizacion de Birmo.

NOVA PROGRESO EN FABRIKADO DE SENJUNTAJ ŜTALAJ TUBOJ

La laboristoj kaj teknikistoj en Ŝtata Hua'an Fabriko lasttempe sukcesis fabriki senjuntajn ŝtalajn tubojn laŭ la plej nova metodo de varma premado, kiu ebligas produkti senjuntajn ŝtalajn tubojn rekte el ŝtal-ingoto, kaj ankaŭ aliajn altgradajn alojajn tubojn aŭ diversformajn blokojn.

ARBOSEMADO PER AEROPLANOJ

Je la 6-a de aprilo en Yuzhong-gubernio de Gansu-provinco oni semis arbosemojn per aeroplanoj An-2 enlande fabrikitaj. La semita areo ampleksis pli ol 600 muojn. La semoj inkluzivas tiujn de piceoj kaj pinoj.

MUSOJN EN MUZEON

Chongqing, granda urbo en orienta parto de Sichuan-provinco estas fama pro multeco de musoj, kies nombro laŭ esploro farita iam trioblis tiun de homa loĝantaro en la urbo kaj kvino-blis en la kamparo. Troviĝis 13 specoj kaj plej pezaj atingis, 1,500 gramojn. Tiajn musojn timis eĉ katoj. Lasttempe en la kampanjo kontraŭ 4 bestaĉoj la musojn en Chongqing oni sukcesis preskaŭ plene neniigi kaj la higienaj instancoj antaŭ nelonge faris specimenojn de musoj kaj ilin donacis al la muzeo por estonta studo.

PASEREKSTERMO EN PEKINO

Ekde la 19-a de aprilo en tri tagoj la loĝantoj en Pekino estis mobilizitaj por ekstermi la paserojn. De mateniĝo ĝis

noktiĝo ĉie troviĝis deĵorantoj brue fortimigantaj la paserojn por malebligi al ili ripozadon kaj manĝadon kaj multaj el ili mortis pro pafoj aŭ venenaj manĝaĵoj. Laŭ statistiko en 3 tagoj oni mortigis entute pli ol 400,000 paserojn.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj

Traduko aŭ aliaj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur:

1) Post la utiligo rimarku el kiu numero de nia gazeto ĝi devenis.

2) Sendu al ni 4 ekzemplerojn de la materialoj sur kiu aperis la tradukoj aŭ alimaniere utiligoj.

3) Sciigu al ni kia estas la eldonaĵo sur kiu aperis via traduko aŭ aliaj utiligoj, se eble ankaŭ nombron de la legantoj.

Per tiaj kunlaboroj, vi multe helpos la pluan prosperon de nia movado en Ĉinio, sekve ankaŭ alportos plian brikon por la sukceso de Esperantomovado en la tuta mondo.

Kurso de Ĉina Lingvo

Ĉina lingvo (pli precize: Han-lingvo) estas uzata de Han-nacio. El la elfosajoj oni konstatis, ke skribadon jam sciis Han-nacio antaŭ pli ol tri mil jaroj. La skribado seninterrompe evoluadis ĝis nun, trapasinte plurajn gravajn ŝanĝigojn en la ekstera formo, kiu tamen restas ideografio kaj malfacila por lerni kaj uzi. La parolantoj de Han-lingvo nombras ĉirkaŭ 600 milionoj. Do ĝi estas unu el la plej vaste uzataj lingvoj en la mondo. En la buŝa uzado de Han-lingvo ja troviĝas multaj dialektoj, sed la skribado de la lingvo en ideografio estas sama kaj unuece komprenata. Cetere la norda dialekto estas uzata plej vaste inter la ĉinoj kaj servas kiel komuna komunikilo inter parolantoj de diversaj dialektoj jam de tre longa tempo. El tio formiĝas la t.n. komuna parollingvo surbaze de norda dialekto kaj prononce normigita laŭ la Pekina fonetiko. Tiu komuna parollingvo ĉina estas nun plenforte disvastigata tra nia vasta lando.

Aliflanke, de kiam Ĉinio estis liberigita el sub la regado de reakciaj fortoj, niaj kontaktoj kun alilandoj fariĝas treege multaj, kaj fremdlandaj amikoj multe interesiĝas pri nia lingvo kaj volas ĝin eklerni. La apero de la Han-lingva fonetika alfabeto ebligas al ni multe pli facile lernigi Han-lingvon al alinacianoj. Ni do ekentreprenas la aferon kaj regule publikigados kurson de ĉina komuna parollingvo en nia gazeto ekde ĉi tiu numero.

Unua Leciono

En ĉi tiu leciono ni pritraktos la fonetikon de ĉina lingvo kaj la uzadon de la fonetika alfabeto.

I. En ĉina lingvo estas dudek du konsonantoj: **b** (p senelspira)*, **p** (p elspira), **m** (m), **f** (f), **d** (t senelspira), **t** (t elspira), **n** (n), **l** (l), **g** (k senelspira), **k** (k

elspira), **ng** (n velara), **h** (h), **j** (ĉ senelspira), **q** (ĉ), **x** (ŝ), **zh ch sh r** (respektive: ĝ ĉ ŝ j kun lango-pinto kontaktigata al palato), **z** (c senelspira), **c** (c), **s** (s).

II. Ses vokaloj: **a** (a), **e** (o kun plataj, nerondaj lipoj), **i** (i), **o** (o), **u** (u), **ü** (i kun rondaj lipoj).

III. Dudek naŭ diftongoj kaj nazaj vokaloj:

1. **ia ua uo** (i u kiel duon-vokaloj, **a o** kiel ĉefaj vokaloj);

2. **ai ao ou** (la postirantaj **i o u** kiel duon-vokaloj);

3. **ei ie ue** (e estas ĉefa vokalo, ĉi tie ĝi prononciĝas kiel e en Esperanto, **i u** estas duon-vokaloj);

4. **an en ang eng ong in ing un;**

5. **uai uei iao iou ian uan ŭan uen iang uang ueng iong** (la mezstarantaj vokaloj estas ĉefaj vokaloj, kaj la aliaj duonvokaloj).

IV. Aliaj vokaloj:

1. **i** post **zh ch sh r z c s** ne prononciĝas kiel ordinara **i**. Ĝi fariĝas iu lango-pinta vokalo, elparolata tuj post **zh ch sh r z c s** kun la prononcorgano en la sama pozicio kiel ĉe elparolo de la antaŭirintaj konsonantoj;

2. **er**. Ĉi tie **r** ne estas elparolata, ĝi nur montras ke **e** prononciĝas kun volvita lango. **r** estas ankaŭ metita post aliaj silaboj, signante ke la antaŭa vokalo estas elparolata kun volvita lango. Ĉe okazo, se la antaŭa silabo finiĝas kun **n aŭ ng**, la **n** kaj **ng** estu prononce preterlasataj.

V. Variantoj

1. **i ia ie iao iou ian in iang ing iong u ua uo uai uei uan uen uang ueng ü ŭe ŭan ŭn** skribiĝas kiel **yi ya ye yao you yan yin yang ying yong wu wa wo wai wei wan wen wang weng yu yue yuan yun** respektive, kiam ili staras nude sen konsonantoj antaŭ si.

2. Post **j q x** la supersigno de **ü** estas ellasita, ekz. **jü qüan xün** skribiĝas kiel **ju quan xun**.


3. **iou uei uen** skribiĝas kiel **iu ui un** kiam ekzistas konsonantoj antaŭ ili, ekz. **niu gui lun** (anstataŭ **niou guei luen**).

* En la parentezoj estas proksimumaj ekvivalentoj en Esperanto.

VI. Signoj por tonoj.

En Han-lingvo tonoj ludas gravan rolon por distingi signifon de vortoj, ekz.: **ma** kun kvar diversaj tonoj povas signifi *patrinon*, *kanabon*, *ĉevalon* aŭ *riproĉi*, respektive laŭ la tono. Tono indikas la altecon kaj ĝian ŝanĝigon de la sono. Estas entute kvar tonoj, kiuj montrataj per signoj sur la ĉefa vokalo de la silabo: la unua tono estas la **altplata** montrata per $\bar{}$, ekz. **mā** (*patrino*); la dua — **altleviĝa** per $\acute{}$, ekz. **tián** (*dolĉa*); la tria — **malleviĝleviĝa** per $\check{}$, ekz. **yuǎn** (*malproksima*); la kvara — **tutmalleviĝa** per $\grave{}$, ekz. **bìng** (*malsano*).

Ni povas priskribi la tonojn per muziknotoj, kiel ĉi sube (oni ilin redonu per violono):



Por precizigi la prononcon, oni devas indiki la tonojn per respektivaj signoj. Sed ĉe okazo sen timo pri miskompreno oni povas ankaŭ laŭ cirkonstancoj tute aŭ parte ellasi la tonindikojn en la teksto. Ĉar ĉe vortoj kun du aŭ pli ol du silaboj la tonindiko ne montriĝas tiom necesa por eviti miskomprenon, kaj ofte la kunteksto ankaŭ helpas evidentigi la sencon.

VII. Divida signo

Silaboj komencantaj per **a o aŭ e** kaj havantaj antaŭ si konsonanton en la sama vorto estas dividataj per divida signo \prime . Ekz. **pi'ao** estas en du silaboj kaj signifas *peltan jakon*, dum **piao** estas en unu silabo kaj havas tute alian signifon: *flosi*.

VIII. En Han-lingvo, konsonantoj estas ĉiam uzataj nur antaŭ la vokalo, sole **n** kaj **ng** troviĝas ankaŭ post ĝi.

IX. Estas entute iom pli ol kvar cent silaboj laŭ sonkombino. Konsiderante la tonojn oni ja povas distingi ĉirkaŭ 1200 silabojn. Fakte, plej multe el la silaboj servas kiel radiko-vorto aŭ vortelementoj.

Tomu

La kamparaj gelernantoj al sia hejmo

Lignogravuraĵo de Ge Ke-jian



La Okcidenta Zhou-dinastio

A. Zhou Konkeris Shang-on

Leviĝo de Zhou-anoj Okcidente de la granda ebena de norda Ĉinio, kuŝis loesa altebena. Ĉiujare en sezono de la malvarma vintro, ventego disblovis malsupren de sur la altaj montoj de la nordokcidento, la flavan teron, kiu iom post iom amasiĝinte fariĝis la fekunda grundo de la alta ebena. La riveroj Jing kaj Wei trafluis orienten tra la okcidenta parto de la alta ebena. La Zhou-anoj jam delonge vivis per terkulturado en la valo inter la du riveroj, kaj pli kaj pli kreskadis.

Ili diris, ke ilia unua praulo nomiĝis Houji, kiu scipovis plantadon de diversaj grenoj, melonoj kaj fazeoloj, kiuj kreskis tre bone ĉe li.

Sur la loesa altebena vivis ankaŭ multaj nomadaj triboj. Ili ofte atakis la Zhou-anojn, kiuj devis kelkfoje translokiĝi, ĝis ili fine venis al Zhouyuan ĉe piedo de Qi-monto.

Zhouyuan estis lando vasta kaj ebena kun grundo tre fekunda. La Zhou-anoj forigis

herbojn kaj arbojn kaj egale disdonis la teron al la kulturistoj.

Ili komencis konstrui domojn. La temploj por kulti al la prauloj estis speciale altaj kaj grandaj. Estis konstruita ankaŭ urbomuroj por sin defendi kontraŭ atakoj de la nomadaj triboj.


Post tio la Zhou-anoj rapide fortiĝis kaj prosperis.

Zhou-anoj Konkeris Shang-on Reĝo Wen-wang ekkondukis la Zhou-anojn fari atakon al Shang kaj akiris multe da tero. Tiam la reĝo de Shang-anoj estis Zhou-wang, kiu estis korupta kaj kruela. Li diboĉis tagnokte kun la aristokratoj. Li konstruigis multajn palacajn domojn kaj bredis en ĝardeno multe da birdoj kaj bestoj. Por militkapti sklavojn, li persone militiris al regiono de la rivero Huaishui por ataki Dongyi (orienta tribo). Lia terura elefanta trupo alportis al Dongyi-anoj grandan katastrofon. Militinte pli ol unu jaron, li akiris grandan kvanton da kaptitoj. Ekscese luksa vivo kaj daŭra militado forkonsumis grandan sumon da riĉaĵo de la lando. Kaj, Zhou-wang kaj la aristokratoj pli intensigis la ekspluatadon al la popolo. Kaj la aristokratoj ankaŭ reciproke invadis kaj rabis. La popolo malsatis. Superregis krizo interne de la ŝtato, kiel diris tiam la aristokrato Weizi: "Shang-anoj estas kvazaŭ en larĝa rivero, kies bordoj estas ne videblaj, kaj la furioza ondo baldaŭ ilin englutos."

En la 11-a jarcento a.K., reĝo de Zhou, Wu-wang, la filo de Wen-wang komandis la okcidentajn tribojn ataki Zhou-wang. La decida batalo okazis ĉe Muye ekster la ĉefurbo de Shang. La soldatoj de la reĝo Zhou-wang estis tre multaj, sed plejparte el ili estis armitaj sklavoj, kiuj ne volis militon, ribelis ĉe la fronto kaj atakis la ĉefurbon de Shang kune kun la Zhou-anoj. Zhou-wang sin bruligis post la falo de la urbo. Tiel pereis Shang-dinastio. Kaj Wu-wang ekfondis Zhou-dinastion, kun Haojing kiel ĉefurbo. Ĝi estas nomata la Okcidenta Zhou en la historio.

Feŭdo-disdonado en la Komenco de Zhou-dinastio La reĝo de la nova dinastio disdonis feŭdojn al la reĝaj familianoj kaj parencoj, ke ili regu la popolon en siaj feŭdlandoj.

La ding-o de Yu de Zhou-dinastio



La malnova ĉefurbo de Shang estis asignita al Kangshu, frato de Wu-wang kun landnomo Wei; la duoninsulo Shandong al Jiang Tai-gong, parenco de la reĝo, kun landnomo Qi; la sudokcidenta parto de Shandong, al la filo de Zhou-gong, kun landnomo Lu; Shānxi al Tangshu, filo de la reĝo, kun landnomo Tang kaj poste Jin. Tiuj kvar landoj okupis la ĉefan teritorion de Shang-anoj. Krome estis starigitaj ankoraŭ multe da malgrandaj feŭdlandoj, kies teritorioj sin etendis ĝis la riveroj Yangzi kaj Hanshui.

La feŭdaj princoj estis heredaj. La reĝaj familianoj geedziĝis kun alifamiliaj vasaloj. La feŭdaj princoj havis devon kune militservi kaj tributon liveri al la reĝo, kaj ankaŭ interhelpi inter si.

B. La Socia Ekonomio de Okcidenta Zhou

La Vilaĝa Komunumo En la teritorioj de la reĝo kaj la feŭdaj princoj sin trovis multaj urboj. Ĉirkaŭe de ĉiu urbo estis vasta kamparo, kiun distranĉis la irigaciaj kanaloj, t.e. vilaĝaj komunumoj, kiuj ekzistis jam de longe. Ĉiu komunumo konsistis el multaj familioj. Ĝi distribuis la teron, kiu estis ĝia publika posedaĵo, al la terkulturistoj. Por reĝustigi la kampojn fekundajn kaj malfekundajn, oni redistribuis la teron post difinita tempo. Melonojn kaj arbojn oni plantis ĉe la limoj inter la komunumoj.

La terkulturistoj plantis grenojn, fazeolojn, legomojn laŭ la sezono. La virinoj kolektis foliojn de la morusarboj, bredis silkraŭpojn kaj ŝpinis kaj teksis. En tempoj ne okupitaj de kulturaj laboroj, la kamparanoj ankaŭ ĉasis bestojn. Ĉiuj de la sama komunumo helpis unu la alian.

Ili devis liveri parton de siaj rikoltaĵoj al la aristokratoj, kies grenejoj ĉiam pleniĝis de grenoj, kaj en la korto abunde pendis la bestoj ĉasitaj de la terkulturistoj. La vestojn de la aristokratoj ŝpinis, teksis, tinkturis kaj faris la kamparaninoj.



La surskribajo sur la ding-o de Yu notas pri diversaj donacoj de Kan-wang al la nobelo Yu

La kamparanoj havis profundan malamon kontraŭ la parazitaj aristokratoj. En jena poemo speguliĝas ilia indigno:

*Vi ne plantas, nek rikoltas,
Kial grenon vi de ni forportas?
Vi ne persekutas, nek vi pafas,
Kial da ĉasaĵoj vi abunde havas?*


Disdono de Terokaj Sklavoj La reĝo kaj la vasaloj ofte disdonis premian teron al siaj idoj aŭ meritplenaj subuloj, kaj kune kun la tero, ankaŭ la sklavojn, kiuj kulturis la teron. La premiitaj aristokratoj ofte muldigis bronzaĵojn vazojn "ding" aŭ "pan", kiel memorajojn, sur kiuj estis notitaj pri la okazaĵo de la premiricevo kaj la kvanto de kampoj kaj sklavoj ricevi-

(Daŭrigo sur p. 104)

Zhou-gong asistas la junan reĝon Cheng-wang



Ĉina Kuirarto



La ĉina kuirarto estas alte taksata. Jam en la 7-a jarcento a. K. famiĝis kuirmajstroj kaj en la 5-a jarcento aperis fakverkoj pri kuirado. Dum mil jaroj senĉese kreskadis la specoj de materialoj por pladoj kaj daŭre pliriĉiĝis la spertoj kaj scioj pri kuirado. Laŭ nekompleta statistiko, nun en Ĉinio estas ĉirkaŭ 5 mil diversmaniere preparitaj legom- kaj viand-mangĝaĵoj. Inter ili multaj estas jam konataj kaj ŝatataj de niaj eksterlandaj amikoj. Por kontentigi la scivolemon de niaj legantoj, la redakcio klopodos enpresigi de tempo al tempo en nia gazeto artikoletojn pri kuir-metodo de kelkaj fame konataj ĉinaj frandaĵoj, kaj tion komencas nun per

Rostita Pekina Anaso

Por prepari tiun ĉi frandaĵon oni uzas anason speciale breditan en Pekino. La t. n. Pekina anaso estas grasigita per speciale preparita nutraĵo kaj prizorgo. Oni enfermas la anasojn en malvastajn kaĝojn, tiel ke ili povas nur eletendi sian kolon eksteren por trinki akvon, sed ne promeni aŭ sin turni en la kaĝo. La nutraĵo estas fingroformaj

(Daŭrigo de p. 103)

taj. La noto finiĝis kutime per la sama frazo: "Por eterna uzado de la filoj kaj nepoj".

La socio de Okcidenta Zhou-dinastio estis ankaŭ sklava socio. La reĝo, la vasalaj princoj kaj la aristokratoj konsistigis la klason regantan dume kamparanoj kaj sklavoj la klason regatan.

La Pereo de Okcidenta Zhou-dinastio La Zhou-anoj bataladis senĉese kontraŭ la nomadaj triboj, inter kiuj Yanyun kaj Xirong estis la plej grandaj kaj fortaj. En la fino de la naŭa jarcento a. K., Zhou-anoj militis kontraŭ Yanyun en la regiono de Shanxi kaj venkite perdis tre multajn soldatojn.

Komence de la oka jarcento a.K. Xirong invadis kaj atakis Zhou-anojn. Ili ekokupis Haojing. La reĝo de Zhou-anoj estis mortigita. Multaj el la popolanoj perdis sian vivon. Post la milito Haojing fariĝis ruino. La nomadaj triboj okupis la regionon de Shanxi. En la jaro 770 a. K., la reĝo Pingwang translokigis la ĉefurbon al Loyi, kaj stariĝis la Orienta Zhou-dinastio, kiel nomata en la historio.

Trad. Zensto

pastajoj de tritika kaj maiza muelajoj kaj brano de sorgo kneditaj kun bolanta akvo. Ĉiu pastopeco pezas ĉirkaŭ 25 gramojn kaj triono de ĝi estas tritika muelajo. Oni englutigas al la anasoj, je la komenco, ĉiutage 4-5 tiajn pecojn, kaj poste plimulte ĝis 12 pecoj. Post ĉiu tria horo oni ilin trinkigas kaj ĉiutagmeze ilin elkaĝigas por naĝi dek minutojn, kaj post tio ili estas denove enkaĝigitaj. Post tri monatoj, la tiel breditaj anasoj jam bone grasigas kaj fariĝas tre dikaj kaj fortaj. Oni nomas tiujn anasojn "glutigita anaso", el kiu estas preparata la rostita Pekina anaso.

En la preparado, unue oni trempas la mortigitan anason en ĵus bolintan akvon por plene deŝiri la plumojn kaj lanugon. La internaĵon oni eligas tra trueto farita sub flugilo. Poste oni enblovas tra ĝia gorgo por ŝveligi la korpon de la anaso kaj tiam ĝin ŝmiri per malsukero maldensigita per akvo, kaj pendigas ĝin en vento por ke ĝi sekiĝu taŭga por rostado. La rosta forno estas hejtata per lignokarbo. Dum la rostado oni devas singarde zorgi ke nur la du flankaj partoj kaj la dorso estas turnataj al la fajro, sed neniam la brusto. Oni devas ankaŭ ŝanĝi tre ofte la rostatan lokon. Post ĉirkaŭ duonhoro, la anasajo jam oleo brilas kaj estas taŭga por frandi. Oni ĝin elprenas el la forno, elverŝas la fluidaĵon el ĝia ventro, kaj tuj en maldikajn pecojn tranĉas ĝian grasan viandon kune kun la malhele flava kaj oleo brila haŭto. Nun la plado estas jam preta. Oni mangas ĝin ŝmiritan per saŭca marmelado el faruno kaj kun cepo, se oni tion preferas. Tiel mangate, ĝi estas vere freŝa, bongusta, delikata frandaĵo.

Rakŝa Timas la Sunon

RAKŜA estas diablo kiu manĝas nur homojn.

La vira rakŝa havas ruĝajn harojn, nigran korpon kaj verdajn okulojn; kaj la ina rakŝa ofte prenas formon de ĉarmega belulino. Ili kaŝas sian veran vizaĝon de hommanĝanto por insidi homojn per ĉiuj rimedoj.

En Budaa sutro troviĝas jena rakonto:

Iu junulo, riĉa je belaj revoj, ŝatis serĉi novajn aferojn. Iutage li piediris sola malrapide sur senhoma kamparo por trovi ion eksterordinaran kaj falis malfeliĉe en la manojn de rakŝa. Tiu intencis trovi oportunan lokon por lin formanĝi, kaj ekkondukis lin al mallumo. Ju pli antaŭen iris la junulo, des pli klare li sentis, ke la direkto estas ne prava, sed li ne sciis kiel sin savi. Tiam, levante la kapon li subite trovis, ke la brusta flanko de la rakŝa estas blanka, dum la dorsa, nigra. Tion la scivolema junulo ne povis kompreni kaj pridemandis al la rakŝa. La lasta diris: "Mi neniam ŝatas la sunon, kaj ĉiam iras kun dorso kontraŭ ĝi, tial la brusto estas blanka, dum la dorso sune nigrita." Subite ekfulmis ideo en la kapo de la junulo kaj per la tuta forto li tiris la rakŝa-n vizaĝe al la suno. Ĉar la rakŝa timas la sunon, do tuj forkuris returnen, kaj el ties manoj liberiĝis la junulo.

Esperantigis Aŭroro



Riparo de Irigacia Kanalo

Xin Ye

Dialogo kun Rivereto

Wang Yi-min

*En vilaĝa najbareco
jubiladas rivereto.*

*"Kial vi, riverflueto,
tiel ĝojas en ĉi jaro,
ne rapidas al la maro?"*


*La flueto ride ondas
kaj sonore min respondas:*

*"Dankon al la anoj kooperativaj,
kiuj digon kun gastam' konstruis,
ke mi restu por la plantojn gardi vivaj."*

Trad. Laŭlum

Forbruligo de Brita Opio en 1839

Gravuris Zeng Zhu-shao





SUR NIA LIBROBRETO

Armena Esperantisto, n-ro 1, Jan. 1958, monata literatur-kultura lerna bulteno de Armena Organiz-Komitato Esperantista, sub aŭspicio de Erevana Ŝtata Universitato.

Jen la unua presita periodaĵo Esperanta el Soveta Unio post la revigliĝo de tiea Esperanta movado! Ĝin sekvas espereble aliaj el la granda lando. Korajjn gratulojn al niaj armenaj kamaradoj.

La bulteno ampleksanta 16 pĝ. plus kovrilo, estas plaĉe presita kun ilustraĵoj. Tiu ĉi unua numero enhavas rubrikojn: El la Armena Literaturo (kun poemoj de H. Tumanjan k.a.), El Mondliteraturo, Originala Poezio, Niaj Famaj Scienculoj (pri fama astrofizikisto Akademiano V. Hambarcumjan), Kroniko kaj Esperanta Kurso por Komentantoj. Krome estas ankaŭ kanto kun muziko por komplezi kantemulojn. Varia estas la enhavo kaj tre bona la lingvo. Ĝi ne nur liveras al niaj armenaj samideanoj modelajn legaĵojn

sed ankaŭ multe kontribuos al la internacia E-movado. El Kroniko ni ĝoje konstatis ke estas oficiale konfirmitaj la Armena Organiz-Komitato Esperantista kaj tiu de Kartvelaj esperantistoj. La bultenon redaktas Prof. D-ro Gurgeno Sevak, estinta L.K.-ano. Red. adr.: Poŝtkesto 78, EREVAN, Armenio, USSR. Bedaŭrinde ne estas indikite, kiamaniere oni povus ĝin akiri, kies abonon ni volonte rekomendas.

Hungara Fervojista Mondo, kvaronjara revuo de la fervojista Esp-movado en Hungarujo, n-roj 3-4 de 1957. Ĝi estas novulo inter la fervojistaj fakgazetoj, kies ekzempleron ni ricevis unuafoje. Ĝi estas gazeto fotopresita kaj ĝia formato estas 20 cm. × 29 cm., kiel tiu de ĝia pliaĝa fratgazeto Jugoslavia Fervojisto, kiu estas pli konata pro pli ol dujara ekzistado. La duobla numero havas 20 paĝojn plus kovrilo. La enhavo estas tre riĉa kaj varia kun multaj bildoj. Apud fakaj ra-

portoj kaj artikoloj interesaj por fervojistoj, inter kiuj cetere nefakuloj ankaŭ trovas pecojn volonte legotajn, la revuo disponigas sufiĉan spacon ankaŭ por literaturo, sporto kaj amuzajo. Ĝi estas nova sukceso ankaŭ por la ĝenerala Esp-movado, kies progresadon en nuna tempo ja impulsas, ĉefe, la fakaj uzadoj de la lingvo.

Ni varme gratulas al ĝiaj eldonantoj kaj niaj hungaraj fervojistaj kamaradoj, kaj rekomendas ĝin al niaj legantoj. La revuon eldonas Ĝenerala Organiza, Sanitara kaj Jura Fako en la Fervoja Ĉefsekcio de la Ministerio de Trafiko kaj Poŝto. Oni povas ĝin ricevi intersanĝe per Esp-aj libroj, gazetoj, prospektoj, glumarkoj ktp. Turnu vin al Centra Fervojista Esperanto-Grupo, Budapest, VI. Népköztársaság-utja 73-75, Hungarujo.

Tik.


KURANTAJ AFEROJ


VALORAJ ĈINAJ LITERATURAĴOJ REDONITAJ DE USSR

Je la 19-a de aprilo, la registaro de Sovetio redonis al Ĉinio du valorajn ĉinajn literaturaĵojn: Bildoj kaj Tekstoj de la "Strangaj Historietoj de Liao Zhai" (novelaro el 17-a jarcento, verkita de Pu Songling) kaj "Zhugongdiao pri Liu Zhiyuan" (rakonto kun kantoj el ĉirkaŭ 12 jarcento). La unua estis forprenita el Pekino de rusa armeo en 1900, kiam la cara Rusio invadis Ĉinion kune kun aliaj 7 ŝtatoj; la dua estis trovita de iu rusa turisto en Norda Ĉinio en 1908. La tuta redonita materialo ampleksas dekelkajn kestojn. Pli antaŭe Sovetio jam redonis al Ĉinio ekzemplerojn de la fama "Yongluo-Enciklopedio" de Ming-dinastio kaj arkivo-kolekton de Qing-dinastio ankaŭ kun tre alta valoro.

La Leviĝo en Wuchang

Gravuris Fu Tianchou







SENMORTAJ ESTAS LA POPOLAJ HEROOJ

La 1-an de majo solene inaŭguriĝis la Monumento de la Popolaj Herooj, kiuj oferis sian vivon en la bataloj de post 1840 kontraŭ la en-kaj ekster-landaj malamikoj por la sendependeco de la patrio. La majestan monumenton plibeligas 10 blankmarmoraj bareliefoj kiuj vive prezentas al ni la forbruligon de brita opio en 1839, la leviĝon de la Taiping-revolucio en 1851, la leviĝon en Wuchang en 1911, la Maj-kvaran Movadon en 1919, la Maj-30-an Movadon en 1925, la Aŭgust-unuan Leviĝon en 1927, la Rezistmiliton kontraŭ la Japanaj Invadistoj kaj la Transmarŝon de Yangzi-rivero de la Popola Liberiga Armeo por la liberigo de tuta Ĉinio.

1. La majesta monumento antaŭ la pordego Tian'anmen en la mateno de la unua de majo, 1958.
2. La Maj-kvara Movado en 1919. (Gravuris Hua Tian-you)
3. La popolo subtenas sian Liberigan Armeon.
(Gravuris Liu Kai-qu)
4. La Transmarŝo de Yangzi-rivero.
(Gravuris Liu Kai-qu)



嘉慶御覽
小寶



朱榮
壽

UNIVERSITÄT
KUL
BIBLIOTEK